

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Militado per
Interreto

Eseo
Vojaĝo en
Kosovo

TURISMO

Bieroj en Belgio

Multspecaj tradicioj

MONATO abontarifoj 2001

Prezoj

| | | MONATO | | LA JARO |
|----------------|-----|--------|------|---------|
| | | surf. | aere | aere |
| Aŭstralio | AUD | 72 | 81 | 11 |
| Aŭstrio | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Belgio | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Britio | GBP | 29 | 32,6 | 3,6 |
| Danio | DKK | 298 | 336 | 38 |
| Finnlando | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Francio | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Germanio (ok.) | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Germanio (or.) | EUR | 32 | 37 | 5 |
| Hispanio | EUR | 32 | 37 | 5 |
| Irlando | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Islando | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Israelo | EUR | 32 | 37 | 5 |
| Italio | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Japanio | JPY | 5900 | 6760 | 860 |
| Kanado | CAD | 67 | 76 | 10 |
| Luksemburgo | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Nederlando | EUR | 39 | 44 | 5 |
| Norvegio | NOK | 340 | 384 | 44 |
| Nov-Zelando | NZD | 82 | 92 | 12 |
| Pollando | PLN | 70 | 90 | 20 |
| Portugalia | EUR | 28 | 33 | 5 |
| Sud-Afriko | EUR | 32 | 37 | 5 |
| Svedio | SEK | 360 | 407 | 47 |
| Svislando | CHF | 65 | 74 | 9 |
| Usono | USD | 47 | 53 | 8 |

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopillo +32 32 33 54 33; retroŝto: admin@fel.esperanto.be.



Vizitu la retajn paĝojn de la revuo
<http://monato.esperanto.be>

Al kiu pagi?

al via landa peranto

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson Street, Redfern, N.S.W. 2016 Aŭstralio. R: esperfed@ans.com.au
Aŭstrijaj: AEM, Margarethengürtel 100 11/2, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511. R: rudipueh@chello.at. • Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. (pĉk. 7.127.144). R: apmarks@ping.at
Belga: FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). R: admin@fel.esperanto.be.
Brazila: BEL, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília (DF). R: bel@brnet.com.br.
Britaj: EAB, 201 Felixtowe Road, Ipswich IP3 9BJ, Britio (pĉk. 54 891 4007). R: eab@esperanto.demon.co.uk. • Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. R: paul@esperanto.freeseve.co.uk.
Ĉeĥa: Vládslav Hasala, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice. R: vlada_hasala@iol.cz.
Ĉina: El popola Ĉinio, P.O.Kesto 77, 100037 Beijing. R: libroservo@china-report.com.
Dana: A. Birkbak, Rugvaenget 46, 2. tv., DK-2750 Ballerup (pĉk. 1705121 Girokontoret Høje Taastrup).
Estona: Virve Ernits, Mahla 65-1, EE-0012 Tallinn.
Filipina: Manfred Führer, Dalongue 2419 Santa Barbara, Pangasinan. R: fam.fuehrer@t-online.de
Finnaj: Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3D32, FIN-04300 Tuusula. Konton-ro: 800029-19438647. • Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, FIN-05510 Hyvinkää, pĉk.427 72-2.
Francaj: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). R: esperanto-france@esperanto.org • Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.
Germanaj: Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (LIGA Augsburg 113514, BLZ 720 903 00) R: maul@newsfactory.net. • Manfred Führer, Am Stadtpfad 11, D-65760 Eschborn (pĉk.: 115471-758 ĉe postbank Karlsruhe; bankkodo 660 100 75). R: fam.fuehrer@t-online.de • Literatura-Servo „Espero“, Rolf Beau, Saxoniastraße 35, D-04451 Althen (Postbank Leipzig konton-ro: 010 2939 901 (BLZ 86010090) R: RoBo.ESPERO@t-online.de.
Hispana: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2° izda., Santander (pĉk.: 03548531).
Hungara: Attila Kovács, Barackos u. 1, 7635 Pécs. R: akovacs@cosoft-bt.com.
Irlanda: Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.
Islanda: Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík.
Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).
Japanaj: KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561. R: kleg@mfv.biglobe.ne.jp. • Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. R: jei@mre.biglobe.ne.jp.
Kataluna: KEA, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).
Kanada: Kanada Esperanto-Asocio, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S6. R: phopkins@uvic.ca
Korea: Korea Esperanto-Asocio, Kangbyon Hanshin Core B/D N-ro. 1601, 350 Mapo Dong, Mapo-gu, Seoul 121-703, Koreio. R: keast@soback.kornet.nm.kr. • Seula Esperanto Kulturcentro, dir. Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, 100-630 Seoul. R: esperant@unitel.co.kr.
Kostarika: Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto miamiau@sol.racsa.co.cr.
Kroataj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb. R: mbelosev@public.SRCE.hr • Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131, Trieste. R: orbispictus@iol.it.
Latva kaj litova: Laimius Stražnickas, a.k. 1469, LT-2040 Vilnius 40, Litovio. R: stralaim@takas.lt.
Luksemburga: LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: 8936-12). R: wickler.albert@gmx.net.
Nederlanda: Libro-Servo Esperanto Nederland, Mamixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem (pĉk.: 111278). • UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. R: uea@inter.nl.net.
Norvega: Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. R: esperanto@online.no
Nov-Zelanda: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, 6001 Wellington. Tel.: (04) 473 0847. Faksilo: (04) 473 0848. R: Sir_Lancelot@compuserve.com
Portugala: PEA, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa. R: ap.esperanto@clix.pt
Pola: Skribu al la eldonejo kaj pagu al Danuta Leyk, konto 10201143-216586-270-41-111 ĉe PKO BP XIV 0/Wwa.
Rusa: Halina R. Gorecka, p.k. 67, RUS- 620077 Jekaterinburg-77. R: hrgo@sbank.e-burg.su
Slovenaj: Višnja Branković, Via Leghissa 6, I-34131 Trieste. R: orbispictus@iol.it. • Jovan Mirković, Mira 5, SLO-2000 Maribor. R: j.mirkovica@siol.net
Sud-Afrika: Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. R: cbeckford@ppc.co.za.
Svedaj: Esperanto-Skolan, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 355001-9. • Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.
Svisa: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.
Usona: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. R: elna@esperanto-usa.org
Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas. R: jebachrich@hotmail.com

aŭ rekte al la eldonejo

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

- Se en via lando ekzistas eŭroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la belga franko (BEF) aŭ eŭro (EUR) kaj dorse de la ĉeko devas troviĝi via bankkartnumero;
 - Posedantoj de VISA-, MASTERCARD-, EUROCARD- aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita letero sian numeron kaj validodaton;
 - Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;
 - Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon; la valuto devas esti la usona dolaro (USD).
- Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvar supraj vojoj, uzu la jenajn, kiuj tamen kostos al vi iom pli:
- Se en via lando ekzistas poŝtĉekkonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekkonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉek-oficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo; aldonu al la sumo 1,50 EUR aŭ egalvaloron pro la bankkostoj;
 - Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 5,58 EUR aŭ ties egalvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi nepre skribu la nomon Flandra Esperanto-Ligo.



Estimataj gelegantoj,

Ĉu vi jam renovigis vian abonon por 2001? Se ne kaj vi loĝas en unu el tiuj landoj, kie ni havas nur unu abonanton, laŭ nia statistiko ni havas ne plu 74 sed nur 73 landojn. En tiom da ŝtatoj fine de 2000 nia revuo havis minimume unu abonanton (pri nombroj de legantoj ni, kompreneble, ne scias). Inter tiuj ŝtatoj kun nur unu abonanto estas – ne mirige – pluraj afrikaj landoj kaj ekssovetiaj respublikoj, sed ekzemple ankaŭ Kolombio kaj Meksiko. Mirige estas, aliflanke, ke en Brazilo troviĝas ne malpli ol 70 abonantoj, kvankam ĝi stumblas de unu ekonomia krizo al alia. Ĉu sufiĉas kiel klarigo, ke la Esperanto-movado tie estas tre aktiva kaj forta? Enigmaj, almenaŭ por mi, estas ciferoj de kelkaj aliaj landoj: kial en Israelo ni havas nur du abonantojn, sed ses en Kubo kaj 11 en Luksemburgio, kial nur kvar en Portugalio (kial en Ganao), kial nur naŭ en vastega Rusio, sed en Kostariko sep? Tradicie multnombra estas abonantaro en skandinavaj landoj, kvankam ili estas relative „malgrandaj”: Islando 12, Norvegio 13, Danio 22, Finnlando 23, Svedio 44. Ankaŭ anglalingvanoj estimas nian revuon, kvankam en usonangla ekzistas multaj „internaciaj” gazetoj: Usono 106 (la 4a rango en la skalo), Britio 58, Aŭstralio 28. La unuajn rangojn tamen daŭre tenas Germanio kun 219, Francio kun 155 kaj Japanio kun 131 abonantoj. La 5an lokon okupas la „hejmlando” de nia magazino, Belgio, kun 92. Nu, kiel vi vidas, MONATO ne nur laŭ sia karaktero estas vere internacia, sed ankaŭ laŭ loĝado de abonantoj.

Sincere via Stefan Maul

| | |
|---|----|
| leteroj | 4 |
| el mia vidpunkto | 5 |
| - Putraj demokratioj | |
| politiko | 6 |
| - INTERRETO: Militado sen bataliloj ▶ | |
| - SLOVENIO: Ordo tordita - dekstren maldekstren | |
| - ALBANIO: Listo de ruzo kaj manipulado | |
| - BELGIO: Demokratio blokita | |
|  | |
| moderna vivo | 9 |
| - IRLANDO: Kiam el fariĝas en ... | |
| - LITOVIO: In-forme | |
| - TRANSPORTO: Forbloviĝas la nuboj danubaj | |
| - AŬSTRIO: Vakeroj de Alpoj | |
| - Notoj: - Traf(ik)a statistiko | |
| - Brrr | |
| - Ŝu'- ĉu? | |
| - Malbonan nokton! | |
| - Flugis sub ponto | |
| ekonomio | 12 |
| - MONDAJ FINANCOJ: Post la kunsido de financistoj en Prago ▶ | |
| - JAPANIO: Ginza | |
| - Energia katastrofo | |
|  | |
| spirita vivo | 14 |
| - ĈEĤIO: La mezepokaj judaj mortintoj fine trankvilaj | |
| - STATISTIKO: Du miliardoj da kristanoj tutmonde | |
| arto | 16 |
| - PENTRADO: „Mia ateliero estas mia ĝardeno” ▶ | |
| - MUZIKO: Ĉarmaj kantoj por infanoj | |
| - BACH 2000: Finiĝis la Bach-jaro | |
|  | |
| turismo | 18 |
| - TRADICIOJ: Bierlando Belgio (Kovrilo) | |
| medio | 21 |
| - AŬSTRIO: Ventelektrejoj en ofensivo | |
| - Notoj: Malsanaj arbaroj de Eŭropo | |
| lingvo | 22 |
| - LA MANĈURA: Formortanta lingvo de malplimulto en Ĉinio | |
| - LATINO: Utilo aŭ malutilo? | |
| novelo | 24 |
| - de Julian Modest: La peko de Ros | |
| eseo | 26 |
| - KOSOVO: Vojaĝimpresoj, somero 2000 | |
| libroj | 31 |
| informoj de l' MONATO | 33 |
| enigmoj | 34 |

Fondi eklezion?

Berveling, kiu emas al la bezono detruo la kongruecon de la *Dominus Iesus* per sia propra vidpunkto pri kristanismo, asertas ke historie tute ne certas ĉu entute Jesuo iam celis fondi eklezion disde judismo (MONATO, 2000/11, p. 18). Sendube tiu ne tute malĉifrebla lia aserto trovas ankoraŭ subtenantojn, kvankam nombre malpliĝantajn; tamen necesas ke ni sukcesu distingi, en Berveling, tion kio devenas el lia historia rekonstruo disde tio kio devenas el lia konfesia kontraŭeco al la universalaj supereco kaj senerareco, kiun la papo atribuas al si. Fakte, la aserto de Berveling kontrastas kun Mateo 16, kun la jesua kredo de sakramentoj, kun la levo de la apostoloj al sacerdota rango de la nova interligo, kun ilia starigo kiel majstroj de popoloj laŭ Mateo 28, kun la daŭra insisto pri la obeo al la episkopoj en paŭlaj leteroj kaj en la tuj sinsekvaj kristanaj komunumoj ktp. Elementoj tiuj kun aliaj evidentigas ke Jesuo intencis originigi eklezion.

Pastro Duilio MAGNANI, Italio

Plej bona analizo

Mi opinias ke MONATO estas valora magazino, ĉar mi ne povas trovi pli bonan analizon ol la „Kanajlo-ŝtatoj” (MONATO, 2000/9, p. 5) en iranaj revuoj. Nia saĝa kaj klarvida eseisto, Stefan Maul, povas analizi tiujn problemojn pli bone ol ĉiu socia kaj politika analizanto.

Abbas MOMENI, Irano

Propono al malpacema pacifisto

G. Ledon bedaŭrante la solidecon de la religia kredo (MONATO, 2000/11, p. 5), ŝajnas forgesi, ke ankaŭ li mem havas kredon (ateistan/klerecan). Do ankaŭ li ne estas tute sendependa en sia fundamento de la vivo.

Kial li maltoleru religian kredon je ununura dio? Li volas batali kontraŭ dumiljaraj muroj de la religioj. En la miliardo da monoteistoj li vidas „devotulojn hipokritajn, halucinantajn, mirakloavidajn” kaj – kio rezultas logike – idiotojn. La muron, kiun li mem konstruas per sia sektopropagando, nature li ne vidas.

Tamen li ne povas akcepti maltoleremon. Bone. Do ni ĉiuj estu toleremaj kaj rigardu ni trans la murojn!

Josef FLIEGNER, Germanio



La eldonejo kaj-stabanoj de MONATO ricevis multajn leterojn kaj kartojn okaze de la nova jaro. Al ĉiuj sendintoj ni dankas elkore kaj reciproke bondeziras.

Ordinara morto

Rusio enterigis la unuajn maristojn pereintajn en submarŝipo „Kursk”. Klariĝas iuj cirkonstancoj de la tragedio. El trovita letero, kiun skribis kapitanleŭtenanto Dmitrij Kolesnikov, estas klare, ke la maristoj sian neeviteblan morton renkontis heroe, kiel veraj viroj. Tamen laŭ artikolo de redaktoro Stefan Maul, „Morti pro prestiĝo” (MONATO, 2000/10, p. 5), rusaj maristoj, kiel ankaŭ pereintaj pasaĝeroj de aviadilo „Concorde”, ne meritis ordinaran morton. Ili ne pereis, ne mortis, sed mortaĉis ... Kvazaŭ iaj kanajloj ... Kvazaŭ bestoj ... (Cetere, ĉi lasta frazo eble ne estas taŭga ekzemplo, ĉar en Esperanto, malkiel en iuj naciaj lingvoj, ne ekzistas malsamaj vortoj kun signifo „morti” por homoj kaj bestoj.) Estas neimageble, ke la aŭtoro tiel malbone opinius pri la pereintoj. Tamen kion li deziris diri, oni povas nur imagi. Verŝajne la redaktoro al sufikso -aĉ deziris doni plian signifon, kiun prezentas nek PIV, nek PAG. Tamen tiaj provoj ĉi-okaze, almenaŭ por mi, estas ofendaj.

Antanas GRINCEVIČIUS, Litovio

Malaktuala

Laŭ artikolo de Garbhan MacAoidh (MONATO 2000/11, p. 12), „nun oni kampanjas por atentigi EU-parlamentanojn pri la netaŭgeco de O’Flaherty kiel irlanda reprezentanto” ĉe la Eŭropa Investobanko (EIB). Tiu informo tute ne plu estas aktuala: jam en septembro Irlando prezentis novan kandidaton, Michael Tutty, kiu ekoficis kiel vicprezidanto de la EIB la 16an de oktobro.

André RUYSSCHAERT, Luksemburgio

Manko de kompatemo

Berveling fakte akuzas je manko de kompatemo la katolikan eklezion (MONATO, 2000/8, p. 22) kies moralaj atentoj celas prizorgi, krom la patrino, la infanon jam ĝuantan je rajto eliri el la sino de sia patrino kaj vivi. Kiu mankas je kompatemo? Kiu prizorgas la vivon de ambaŭ aŭ kiu pravigas murdon de la infano? Tiom pli ke la naskota infano ne pezos, finance kaj eduke, sur la dekkvarjaraĝa handikapita patrino, ĉar aliaj patroj kaj patrinoj pretas ami kaj eduki ĝin.

Luciano MANTAUT, Italio

Fonemo kaj fonetikaĵo

Leteroj pridiskutas la prononcmanneron de la franca litero „r” (MONATO, 2000/10, p. 4). Brian Moon konstatas: „la celo de niaj prononcindikoj ... estas montri, kiel oni elparolu nomon laŭ maksimume rekonebla maniero.” Cherpillod asertas aplombe: „La franca lingvo konas la (likvidan) fonemon R, kiu estas tre ofta sed ne konas la (velaran) fonemon Ĥ ..”. Tiuj asertoj meritas komenton. Oni ne konfuzu la fonemojn kun la fonetikaĵoj. Fonetikaĵoj estas la konkludo de analizo de la sonoj tiaj kiaj ili estas eblaj. Fonemoj estas la fonetikaĵoj kiuj ekzistas en lingvo kaj en kiu ili kapablas distingi inter iuj vortoj. La du fonetikaĵoj cititaj de Brian Moon estas la sama fonemo.

La volitivo uzata de Brian Moon montras celon, kiun li difinas: „montru kiel oni parolu la nomon laŭ maksimume rekonebla maniero.” Kio signifas rekoni? Kiam iu japano aŭdas francon kiu vokas sian edzinon Catherine [katRin] kie [R] estas kartave prononcata, kiu signo pli elvokos tiun sonon ĉu „r” ([R] kiam la pinto de la lango vibras) aŭ „ĥ” ([X] kiu estas velara kiel [R])? Mi vetas por „ĥ”.

Fernand BOYET, Francio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn kaj glatigi la stilon (=zamenhofa!). Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

MONATO (Leteroj)

Frankrijklei 140

B-2000 Antwerpen

Belgio

Retadreso:

guido@fel.esperanto.be

Putraj demokratioj

La lastatempaj fraŭdoj dum „demokrataj” elektoj en Peruo kun diktatoro Alberto Fujimori [fuĝimori] kaj en Jugoslavio kun faŝisto Slobodan Miloŝeviĉ montras misfunkciadon de demokrataj procedoj.

Kio estas demokratio?

Tuta 143-paĝa libreto de David Beetham kaj Kevin Boyle, kun tiu titolo, eldonita de Universala Esperanto Asocio, prezentas 80 demandojn kaj respondojn pri la temo. Bedaŭrinde la kriterio por pritrakto de la demandoj aperas sur falsa bazo: „... Ĉar la ŝtato estas la plej inkluziva homa grupo, kun la rajto reguligi la aferojn de la socio kiel tuto, kun la povo kolekti devigajn impostojn kaj la povo pri vivo kaj morto super siaj anoj, demokratio sur la ŝtata nivelo estas de kerna graveco. Tial ni okupiĝos plejparte pri la demokratieco de la ŝtata regado.”

Sekve estas vana okupiĝo, fronte al tiuj ŝtataj, sklavigaj povoj. Kaj la pensulo Henry Hazlitt antaŭ jardekoj jam diris: „La ŝtato estas tiu granda fikcio, kie ĉiu klopodas vivi je alies elspezo.” Individuaj decidoj povas kontrasti al kolektivaj decidoj por atingo de popola rego. La tezoj, antitezoj kaj sintezoj estas faritaj de homoj, kiel diris Lenino, de „la utilaj idiotoj”. Tiuj utilaj idiotoj obeas al la „granda fikcio” por la „unika klopodo vivi je alies elspezo”... ĝis absoluta putro, ekzemple la sistemoj de Lenino mem, Miloŝeviĉ kaj Fujimori.

La vorto „demokratio” per si mem estas tre simpla kaj klara: demo = popolo, kratio = rego, do regado de popolo fare de la popolo. Spite al la akceptitaj mitoj (ne homkonformaj) pri kolektivo, popolo konsistas el individuoj, sekve aŭtenta demokratio estas la regado de la individuo per si mem, t.e. memregado.

Vole-nevole aperas jen „anarkio”, vorto abomenata pro konataj historiaj faktoj. Abomenata kaj do abomeninda, ĉar la homoj ne scias, ne volas, ne kapablas sin regi. Ili sin kroĉas al religioj, al doktrinoj, al leĝoj kiuj sklavigas ilin nome de ŝtato. Ĉar la sistemoj kreitaj ne sukcesas funkcii, ree aperas malordo, perversioj, do ree la abomeninda vorto „anarkio”, sed en la mala signifo rilate al demokratio.

La bonaj diktatoroj

El vidpunkto de ŝtata regado, Hitlero, Musolini, Peron, Stalino, Franko, Fujimori kaj iuj aliaj Fideloj, siatempe estis bonaj diktatoroj ĉar pli ol 50 % el la popolo aprobis aŭ aprobas ilin (almenaŭ ŝajne). Dum la pasado de la tempo, tamen ne ĉiuj homgrupoj povas samtempe „vivi je alies elspezo”, tial aperas la alterno de povo, kelkaj diktatoroj falas

dum venas aliaj por defendi la interesojn de aliaj grupoj.

La usona sistemo estas la plej bona ekzemplo en alternado de povo, en rego-ludo, inter la tielnomataj demokratioj kaj respublikanoj, kie fundamente ĉiam estas la sama ŝtata strukturo, la bona diktaturo, kie fakte la homo (prezidento aŭ diktatoro) ne gravas. En tiu ludo estas malfacile kalkuli la kostojn de la manovroj por balotado.

Por bona, sincera demokratio la ŝtatoj malpermesas uzon de ekonomia povo. La prohiboj ne forigas kaŝajn, subtablajn traktadojn. En partipolitika agado koruptado, premoj pro apartaj influoj ne estas eviteblaj ... kial ne sukcesi je alies elspezoj? Ĉu la konataj epizodoj de korupto kun Mitterrand [miterrán] kaj Helmut Kohl [kol] en demokrataj landoj de Eŭropo ne estas taŭga pruvo pri putreco de demokratioj?

Forto de korupto


La korupto estas tiom forta, ke ĝi detruas ŝtatajn leĝojn, ni vivas en „Mondo sen leĝo” kiel skribis Eva Joli kaj aliaj juristoj rememore al 26 kolegoj murditaj de mafioj, de ĉiuspecaj ŝakristoj. La ŝtato ne plu regas la socion ĉar la sistemoj estas putraj. Sistemoj instalitaj ja de bonintencaj, sed hipokritaj amnestiuloj kaj defendantoj de pseŭdaj homaj rajtoj, (malutilaj idiotoj), kie ŝakristoj, ŝtelistoj, anarkiistoj (en la dua signifo), ostaĝistoj ktp havas pli da rajtoj ol ties murditaj viktimoj.

En Brazilo, Kolombio, Peruo la ŝakristoj pri drogoj, la banditoj, jam montras pli da povo ol la ŝtato, ol la polica aparato. En la fikcia ŝtato venkis ne la rajtoj de honestaj homoj, sed la plej basaj, putraj, koruptaj agmanieroj, nome de demokratio.

En mia urbeto de 40 000 loĝantoj mi (permesu la pronomon) ĵus spektis scenojn malfacile prikribeblajn okaze de elekto por municipestro kaj la koncernaj konsilantoj. Ses da kandidatoj por unu posteno por la estro, 150 kandidatoj por 15 konsilantoj. Jen partiaj disputoj, flagoj, standardoj, banderoloj, flugfolioj kun plej demagogiaj, orgiaj, malhonestaj promesoj, eksplodoj de raketoj, diskursoj meze de folkloraj dancoj, kamparanaj kanzonoj, distribuo de ĉemizetoj, multkoloraj ĉapetoj, promesoj de dungoj, donaco de bazaj manĝaĵoj, senpaga plenigo de aŭta benzinujo, senfinaj defiladoj de politikaj sponsoroj, garantioj pri senlabora salajro, ktp. ktp. cele al simpla voĉo de iu gapanta, senkonscia popolo submetita al korupta, putra agmaniero, nomata demokratio.

La utilaj idiotoj ricevas la regantojn kiujn ili meritas.

Gilbert LEDON



INTERRETO

Militado sen bataliloj

La vivo plenas je paradoksoj. Unu el ili estas jena: kiel konate, la plej moderna komunikilo, Interreto, originas precipe en la deziro de usonaj militistoj interkomuniki laŭeble rapide kaj perfekte.

Intertempe Interreto furoras tutmonde, ĉiamaniere, ĉiukampe. Ni ne plu povas imagi funkciantan mondon sen ĝi. Sed nun tiu ĉi komunika rimedo povas facile fariĝi rimedo de militado, de militado sen bataliloj.

Tiun ĉi alarman averton pri tute nova dimensio de militoj enhavas raporto de la plej grava germana sekretservo BND (= *Bundes-Nachrichtendienst*, federacia inform-servo). La internacie aganta BND kun granda emfazo atentigas, ke en iuj landoj oni jam sisteme trejnatas soldatojn por „informmilitado”, kiel fakuloj iom simplige kaj erarige nomas la novan metodon. Pli ĝuste estas militado per elektronikaj komunikiloj, por tiel manipuli, haltigi, kolapsigi, detrui informadon helpe de la plej moderna komunikilo, Interreto, kaj al ĝi ligitaj komputilaj sistemoj.

Malstabiligo

„La minacoj ne limiĝas kiel ĝis nun al perdoj en batalado, sed oni povas ene de ege mallonga tempo malstabiligi aŭ en ekstrema okazo eĉ detrui modernan ŝtatsistemon.” Jen la kerna eldiro de la BND-raporto. Ĝi atentigas pri tio, ke en industriaj ŝtatoj elektroniko kaj komputiloj regas kaj regulas preskaŭ ĉion. De komputiloj kaj komputilaj retoj (inkluzive de Interreto) dependas ŝtataj kaj administraciaj instancoj, polico, armeo, bankoj, publikaj servoj, telefonretoj, trafikado, energiservoj (atomcentraloj!), industrio, komercado, malsanulejoj, fajrobrigado ... ktp, ktp. Estus pli facile, serĉi iun kampon de moderna vivo de moderna ŝtato, en kiu *ne* rolas elektroniko, komputado, Interreto – eble nur

pedirantoj kaj biciklistoj estas relative sendependaj (se ili ne devas obei al trafiklumoj).


Terorismo-fakulo Walter Laqueur [valter laker] klarigas: „Kial oni ekflamigu militon laŭ tradicia maniero kontraŭ homoj kaj konstruaĵoj, se atako kontraŭ la elektronikaj ŝaltcentraloj de ŝtato efikas multe pli dramajn kaj pli longe sentebajn rezultojn?” BND prognozas, ke „komputiloj, retpiratoj, virusoj kaj trojanaj ĉevaloj estos integraj partoj de internaj kaj internaciaj konfliktoj”.

Multaj manieroj

„Trojanaj ĉevaloj” estas programoj, kiuj je certa dato aŭ je certaj medikondiĉoj startigas misfunkciojn de komputiloj. Virusojn la malamiko kontrabandas en komputilajn retojn por kolapsigi ilin. Krøme eblas teknika atako: aparateto lokita apud elektronikaj ŝlosilaj instalaĵoj povas konfuzi kaj interrompi komunikfluojn. Retpiratoj, tre inventemaj kaj lertaj, ofte uzas tre simplajn metodojn. Ekzemple en februaro 2000 la komputiloj de grandaj usonaj Interret-servoj kolapsis, ĉar ilin inunde atakis (kaj fine blokis) abunde senditaj sensencaj demandoj.

Cetere, oni kompreneble povas kombini ankaŭ „tradiciajn” batalilojn kun elektronikaj. Tion faris usonaj aviadistoj dum la NATO-atakoj kontraŭ Jugoslavio, manipulante fikciajn aviadilojn en la celprogramojn de la serba radar-defendo, kies raketoj sekve „trafis” nur fantomojn. Krome la usonaj specialistoj tiamaniere kolapsigis kurentoservojn kaj komunikilojn de la serba armeo. Inverse serboj inundis la retpoŝtkeston de NATO per amase senditaj leteroj, tiel ke poste ĝi dum multaj horoj ne funkciis.

Kiel ajn, la mondvastaj elektronikaj, precipe komputilaj kaj interretaj, sistemoj ŝajnas fariĝi batalekampo de la estonteco. Ke per tia „informmilito” ne mortus homoj, tamen estas trompa aserto. Se pro tia atako – en ekstrema okazo – ne plu funkcias, ekzemple, kliniko, pacientoj en operacia salono probable ne havas grandan ŝancon transvivi. Fajrobrigadojn ne atingos alarmo kaj homoj mortos en brulanta domo. Se trafiksisistemoj kolapsos, kolizioj de aŭtoj, tramoj kaj fervojoj estas programitaj, kaj pasaĝeraviadiloj kraŝos ne pro lingva miskompreno, sed pro kompleta manko de komunikadoblo. Ni lasas al la leganto imagi kromajn sekvojn. Stefan MAUL



BND-raporto: „Oni povas en ege mallonga tempo malstabiligi modernan ŝtatsistemon.”

Ordo tordita – dekstren maldekstren

Okazis en Slovenio la triaj balotoj, ekde kiam la ŝtato fariĝis memstara. Partoprenis preskaŭ 20 diversaj partioj kaj voĉdonis 70 % de la loĝantaro. Kvankam oni altigis la sojlon por eniri la parlamenton de 3 % ĝis 4 %, sukcesis elektiĝi ok partioj (antaŭe ses).


La ĉefa venkinto estis la Liberala demokrata Partio de Janez Drnovšek, prezidanto de la registaro dum la plimulto de la tempo ekde 1991 kaj arĥitekto de la ekonomiaj sukcesoj kaj evoluo de Slovenio. Lia partio kreskis de 27 % ĝis 36,3 % en la balotoj kaj ricevis 34 el la 90 parlamentaj lokoj. La ĉefa perdinto estas la Popola Partio, kiu ŝrumpis de 19 % ĝis 9 %.

Novkapitalistoj

La Liberaldemokratan Partion oni konsideras maldekstra kaj la Popolan Partion dekstra: oni povus diri, ke venkis maldekstra tendenco. Tamen en Slovenio regas tordita ideo pri dekstreco kaj maldekstreco. Praktike ne ekzistas maldekstraj partioj. Ekzistas eĉ du, kiuj laŭnome estas socialdemokrataj: la Socialdemokrata Partio de Janez Janša (efektive dekstra partio, forte ligita al la katolika eklezio) kaj la Komuna Listo de Socialdemokratoj (ZLSD, heredinto de la iama komunista partio kaj kies plej influaj membroj estas la novkapitalistoj, kiuj posedas fabrikojn kaj entreprenojn).

La Popola Partio, kune kun la kristandemokrata Nova Slovenio, ja deklaras sin dekstra, dum la Liberaldemokrata Partio estas efektiva kapitalisma, do dekstra. La Naciisma Partio de Zmago Jelenič certe estas dekstra. Nur al la Partio de Emerituloj kaj al la Partio de Gejunuloj oni ne povas antaŭmeti iun signon. Efektive, laŭ ekonomia politiko kaj internaciaj celoj (evoluigi sukcesan sociliberalan kapitalismon kaj esti akceptita en Eŭropa Unio kaj en Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo), ĉiuj estas egalaj.

Fakte, konsideri partion dekstra aŭ maldekstra dependas de historio, nome ĉu la partio defendis aŭ ne defendis la rolon de partizanaj komunistaj taĉmentoj en la kontraŭfaŝisma batalo. Pro tio, ke ĝin defendis la Liberal-



Janez Drnovšek: venkita.

ALBANIO

Listo de ruzo kaj manipulado

Komence de oktobro okazis en Albanio lokaj balotoj. Post naciaj balotoj en 1997, kiam socialistoj reakiris la ŝtatpotencon sed intertempe ne plenumis siajn promesojn al la popolo, demokratoj esperis sukceson. Sed tio ne okazis ĉar, laŭ demokratoj kaj aliaj opoziciaj partioj, la regantaj socialistoj realigis tre ruzan manipulan planon.

Kutime oni manipulas balotilojn sed ĉi-foje la registaro alimaniere agis. Unue ĝi fondis t.n. Centran Balot-Komisionon konsistantan el socialistoj aŭ ties simpatiantoj, eĉ familianoj. Due oni kompilis du listojn: A-liston, surbaze de kiu oni havigis al civitanoj identigajn kartojn; poste la listo estis reduktita je 35-40 % por ekskludi simpatiantojn de demokratoj kaj opozicio; kaj B-liston, publikigitan lastminute pro opoziciaj protestoj kaj montrantan ĉiujn voĉrajtigatajn civitanojn, eĉ mortintojn aŭ tiujn, kiuj fuĝis eksterlanden dum diktaturo komunista.

Urbestroj

Evidentiĝis tamen, ke por multaj B-listanoj estis ŝanĝita la balotejo.

demokrata Partio, ZLSD, la Emeritula Partio kaj eĉ la Naciisma Partio, oni taksas ilin maldekstraj.

Granda surprizo

Dum la balotoj, okazintaj la 15an de oktobro, sukcesis eniri la parlamenton du novaj partioj: Nova Slovenio kaj Partio de Gejunuloj – tiu ĉi lasta per iom pli ol 4 % estis granda surprizo. Tamen malgraŭ la novaj partioj la rezulto de la balotoj ebligas al malnova prezidanto kunmeti novan „maldekstran” registaron.

La balotoj montras, ke la slovena popolo premiis Drnovšek-on pro lia ĝisnuna stirado de la ekonomio kaj deziris neniun ŝanĝon. Slovenio estas la sola eksjugoslava respubliko, kiu estas unuavica kandidato por membriĝi en Eŭropa Unio: fakte laŭ sia nacia produkto Slovenio jam superas Grekion kaj Portugalion kaj jam akiris internacian reputacion. La usona prezidanto Clinton vizitis Slovenion, kiu jam de du jaroj estas membro de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj kaj eĉ prezidis ĝin. Plue, Slovenio estas ofte konsultata pri demandoj koncerne eksan Jugoslavion.

Zlatko TIŠLJAR

Loĝanto de kvartalo A en urbo M trovis ekzemple sian balotejon en kvartalo B de urbo N, kio malebligis partopreni la balotojn. En unu balotejo el tuta B-listo konsistanta el 350 nomoj voĉdonis nur sep personoj. Tiamaniere restis ekster la balotado ĉ. 660 000 homoj el malpli ol tri milionoj da voĉdonrajtigitoj. En la ĉefurbo el 338 000 voĉdonrajtigitoj ne povis baloti ĉ. 74 000. Pro tio en urboj, kie oni atendis opozician venkon, kaptis socialistoj la postenojn de urbestroj.

En pli ol duono de la elektaj distriktoj neniun kandidato gajnis pli ol 50 % de la voĉoj kaj la tutan procedon oni devis ripeti post du semajnoj. La opoziciaj partioj sentis sin perfiditaj kaj rifuzis partopreni la duan rondon. Bedaŭrinde internaciaj observantoj, ekzemple de la Eŭropa Unio, reagis nek forte nek adekvate. Ili deklaris, ke „okazis malglataĵoj sed ne tiomgrade por influi la rezultojn”. Tia nerespondeca sinteno ege seniluziigis la opozicion, kiu alvokis surstratajn protestojn kontraŭ la manipulado, por ke ĝi ne ripetiĝu dum la naciaj, parlamentaj balotoj en junio 2001.

Bardhyl SELIMI

Demokratio blokita

Direktiĝis post la oktobraj komunumaj elektoj en Belgio ĉiuj okuloj al Antverpeno, kie la ekstremdekstra Flandra Bloko trovis sin sufiĉe potenca por lamigi urban regadon.

La aliaj partioj, sin nomantaj „la demokratiaj partioj”, kiuj jam decidis ne kunlabori kun Flandra Bloko, devis trovi inter si kompromison por estri la urbon. Ĉar la partioj konsistas el dekstra, centra, maldekstra kaj verda grupoj, evidentas, ke kompromisi ne facilas.

Premis la aliajn partiojn Flandra Bloko, kiu proponis al la ĉefo de la liberaluloj la postenon de urbestro, kondiĉe ke tiuj kune kun Flandra Bloko estru la urbon. La antverpena koalicio eltenis; tamen ne aliloke en Flandrio. En Vilvoorde, antaŭurbo de Bruselo kaj loĝloko de la iama ĉefministro Jean-Luc Dehaene [ja-lik dehane], ekestis malakordo inter liberaluloj kaj la kristandemokrata partio (CVP) de Dehaene. Tiu, ambiciinte la urbestrecon, tamen ne sukcesis akiri sufiĉe da seĝoj por atingi kun socialistoj kaj verduloj majoritaton. Mankas al la kristandemokratoj unu seĝo.

Urbestra skarpo

Finfine disvastiĝis la novaĵo, ke membro de Flandra Bloko pretus aliĝi al la kristandemokrata partio aŭ membriĝi kiel „sendependulo” en la komunuma konsilio. Tio permesus al Dehaene akiri la sopiratan urbestran skarpon. Jen si-



Dewinter de Flandra Bloko ĝojkriis, sed ne tre longe.

tuacio laŭ la aŭstra modelo: interpartia malkonkordo malfermas la pordon al dekstruloj, por ke tiuj sin premtrudu en registaran pozicion.


La kristandemokratoj asertis, ke ilin alvokis la koncerna membro de Flandra Bloko, Rita Van Dam; CVP tamen povis akcepti nur la „sendependulan statuson” kaj promesis nenion ajn. Van Dam ĵuris, ke alparolis ŝin gravuloj el CVP kaj promesis skabenan seĝon. Plie, pri sia demarŝo, ŝi informis la nacian partion, kiu permesis tiun ĉi paŝon por vidi, kiom CVP cedus. CVP insistis, ke Flandra Bloko starigis por ĝi kaptilon; Flandra Bloko rebatis, ke en propran kaptilon falis CVP.

Oni povas miri, ke Dehaene, sperta pri tikla belga politiko, tiel facile kapteblis. Aliflanke, li estas politike tro ruza por riski infekton de Flandra Bloko. Kio ajn estas la vero, klare videblas, ke necesas socia purigado, por ke denove regu demokratio kaj fido je politika agado. Same klaras, ke tiu ĉi afero ege malhelpas atingi tiun celon.

Guido VAN DAMME



Dehaene (dekstre): "Ne ni kulpas, sed sinjorino Van Dam" (maldekstre meze).




Ne forgesu min...



- diverslandaj festotagoj
- lun-fazoj
- aliaj informoj



Donacu ĝin
al viaj amikoj!
Rabato de 33% por
sendaĵo de
3 ekzempleroj
aŭ pli.



LA JARO

praktika Esperanto-agendo

formato 10x15cm; prezo: vidu p.2
mendu ĉe FEL, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen

butiko@fel.esperanto.be

+ 32 3 233 54 33

IRLANDO

Kiam el fariĝas en ...

Jam de pli ol du jarcentoj Irlando estas konata kiel lando de elmigrantoj. En epokoj de malriĉeco, multegaj trovis novan hejmon en landoj de la „Nova Mondo”.

Sed lastatempe elmigrado fariĝis enmigrado.

Kiel aliaj membroj de Eŭropa Unio, Irlanda Respubliko prosperas. Pro tio, kaj pro konstante kreskanta nombro da rifuĝintoj, azilpetantoj kaj tiel nomataj „ekonomiaj migrantoj” el diversaj regionoj de la mondo, Irlando ricevas ĉiunmonate proksimume 1 000 petojn por resti en la lando.

En multaj aliaj ŝtatoj tiu ĉi kvanto apenaŭ rimarkindus, sed en relative malgranda insulo kia Irlando, kies loĝantaro plejparte homogenas, ĝi iom timigas la publikon kaj embarasas la aŭtoritatojn. Sekve, preskaŭ ĉiutage raportas amas-komunikiloj pri negativa reago kaj ksenofobio kontraŭ eksterlandanoj, precipe kontraŭ tiuj, kies haŭtkoloro nigras aŭ iom malhelas, ekzemple afrikanoj aŭ rumanaj ciganoj.

Atencoj

Trafataj estas ne nur azilpetantoj kaj rifuĝintoj. Minacate, nigraj aktoroj el Anglio, rolantaj en teatraĵo en Dublino, devis forlasi sian loĝejon. Malgraŭ tio, ke multaj enmigrantoj informas, ke ili estas afable traktataj en Irlando, okazis atencoj kontraŭ turistoj kaj homoj el EU-landoj laborantaj aŭ studentaj en la Respubliko. Tamen laŭŝajne kelkaj atakoj okazas por ŝtelado kaj ne pro ksenofobio.

Decaj irlandanoj esperas, ke negativaj sintenoj iom post iom malaperos, kiam la publiko estos alkutimiĝinta al la ĉeesto de fremduloj. Ili ne volas, ke evoluu flanke de mallarĝmensuloj rekta rasismo, kiu neniam funde fenomenis en Irlando. Garbhan MACAOIDH



Cent mil bonvenigoj: tiel irlando salutis en la gaela lingvo vizitantojn kaj turistojn. Sed ne ĉiam temas pri bonvenigoj.



LITOVIO

In-forme

Bluokula blondulino, kiu aŭskultas klasikan muzikon kaj kanzonojn de Elton John [ĝon]: jen – laŭ enketo inter pli ol 300 virinoj inter 16 kaj 29 jaroj – tipa litova junulino. La plej maltipa estas cindrahara virino kun helgrizaj okuloj. La virinoj plejparte preferas nigrajn aŭ blankajn subvestaĵojn, kiujn ili elektas ĉefe laŭ stilo.


Laŭ 29 % de la virinoj plej kortuŝas klasika muziko. Ĉiu kvina virino elektis tamen rok- aŭ pop-muzikon, ĉiu deka ĵazon, bluson aŭ elektronikan dancmuzikon. Inter kantistoj elstaras Elton John, inter grupoj „Enigma”. Inter litovaj kantistoj menciigis Julio Iglesias. LAST



Tipaj litovinoj estas bluokulaj blondulinoj, kiuj preferas aŭ nigrajn aŭ blankajn subvestaĵojn.

Vakeroj de Alpoj

Ili aspektis impresive: pintaj ĉapeloj, hakilo en la mano, daŭre drinkemaj kaj batal-emaj – jen la „vakeroj de Alpoj”. Hodiaŭ ilia profesio estas preskaŭ forgesita: flosigado.



Tamen la tradicio vivas: inter la 31a de aŭgusto kaj la 3a de septembro 2000 okazis la 12a Internacia Flosista Renkonto en Karintio, la plej suda aŭstria federacia regiono.

Venis delegacioj el Germanio, Finnlando, Italio, Norvegio, Slovenio, Ĉeĥio kaj Hispanio por perflose navigi kun aŭstroj 60 km sur la rivero Drau. Veturis ok flosoj, ĉiu 12 m longa kaj 4 m larĝa, por po 25 personoj.

Flosigado estis en Karintio grava transportmaniero inter 1200 kaj 1940. La flosoj estis faritaj en flankriveroj de Drau. Per salikbranĉoj oni ligis 15 arbotrunkojn kaj sur tiuj kruce pliajn trunkojn. Tia flosa povis porti ĝis 150 trunkojn. Ofte sur flosa staris kabano kun forno. Kvar aŭ kvin flosistoj stiris. Veturdistanco estis inter 10 kaj 90 km, meza rapideco po 10 km hore. Inter 1920 kaj 1940 estis transportitaj 500 000 kubaj metroj da ligno. Poste oni transportis lignon per fervojo kaj kamionoj. Hodiaŭ tiu danĝera laboro estas nur tradicio sen ekonomia fono.

Walter KLAG

Traf(ik)a statistiko

Laŭ statistikoj pereas pro aŭto-akcidentoj ĉiujare en Irano pli ol 15 000 homoj. Tio signifas, ke preskaŭ ĉiuhore mortas surstrate du homoj kaj vundiĝas ses. En la parlamento oni starigis komisionon por konsideri kaj solvi la problemon.

Hamizeh SHAFIEE

Brrr...

Futbalon ludis geukrainoj ĉe norda poluso – kaj kelkaj tie eĉ naĝis. La „matĉo” okazis, kiam 22-homa skipo sukcese atingis la poluson per paraŝutoj, saltinte el arma aviadilo je alteco de 1500 m. Samtempe kreis rekordon la pilotoj, kiuj unufoje surterigis aviadilon ĉe la poluso sur nepreparita loko. Tia temperaturo: -27 gradoj.

Araneo

Ŝu' – ĉu?

Kredeble per ŝuo haltigis flughavena deĵoranto en Israelo litovan aviadilon. Laŭ israela raporto misfunkciis la bremsoj de aviadilo staranta sur deteriĝejo. La maŝino ekruliĝis: flughavenisto ĵetis subraden siajn ŝuojn kaj tiel haltigis la aviadilon. Tamen reprezentanto de la flugkompanio nomis la aferon „kurioza” kaj neis, ke la bremsoj misfunkciis.

LAST/pg

Malbonan nokton!

Laŭ esploroj en Litovio ĉ. 50 % de la popolo mallonge kaj nesufiĉe dormas. Litovoj dormas mezume ne pli ol 6 horojn: malbona rezulto kompare kun aliaj eŭropaj landoj. Efektive aŭto-akcidentoj devigis esploron pri maldormo: kalkulite estas, ke ĉ. 20 % de la akcidentoj okazas pro ekdormo de ŝoforoj. Apartan problemon kaŭzas turismaj firmaoj, kiuj por ŝpari monon dormigas aŭtobus-ŝoforojn ne en hoteloj, sed en la veturiloj. Ĉi-somere du aŭtobusoj el Litovio suferis akcidentojn en Pollando. Oni suspektas, ke la ŝoforoj ekdormis.

Antanas GRINCEVIČIUS/pg



En septembro litova aviadisto Jurgis Kairys efektivigis tion, kion ĝis nun faris neniu alia en la mondo. Sian aviadilon li pilotis renversite sub ponto trans rivero Nemunas. Ĉeestis ne nur miloj da spektantoj sed ankaŭ monda aŭtokonkursa ĉampiono Mika Hakkinen. Monpunon tamen riskis la aviadisto pro tio, ke sur la flugmaŝino estis reklamataj produktaĵoj de tabakfirmao.


LAST/pg



Forbloviĝas la nuboj danubaj

Nova ponto sur la rivero Danubo estos konstruita inter Bulgario kaj Rumanio. Post 10-jara debato estis decidite konstrui 1275 metrojn longan ponton inter la nordokcidenta bulgara urbo Vidin kaj la transrivera rumana Calafati [kalafati].

Nuntempe la sola ligo inter ambaŭ urboj estas pramŝipo, kiu ne plu sufiĉas por la pliintensiĝanta vojtrafiko inter Bulgario kaj Rumanio. Pro la ponto tamen povus komenciĝi por Vidin kaj Calafati nova erao. Vidin situas en ekonomie kriza regiono de Bulgario: la ponto alportos prosperon al loĝantoj, devigataj serĉi laboron en Hispanio aŭ Italio. Transrivere, en Calafati, atingis senlaboreco 70 % de



Revenos trafiko al rivero Danubo danke al Eŭropa Komisiono. Ĝi disponigos 22 milionojn da eŭroj – 85 % de la kostoj – por forigi la restaĵojn de tri pontoj ĉe la urbo Novi Sad, detruitaj dum bombardado fare de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO). Tiel denove navigeblos la rivero tra Jugoslavio. Intertempe kaj Jugoslavio kaj najbaraj landoj – ekz. Bulgario kaj Rumanio – suferas grandajn ekonomiajn perdojn pro manko de river-trafiko.

Forigo de la pontoruinoj kaj de restantaj minoj daŭros kelkajn monatojn. Lige al la projekto la prezidanto de Eŭropa Komisiono, Romano Prodi, volas, ke estu starigita internacia organizaĵo por respondeci pri la navigebleco de la rivero. Plue, membroj de la nuna Danuba Komisiono trovu la kromajn 15 % de la sumo por finance subteni la projekton.

Evgeni GEORGIEV

la loĝantaro, multaj firmaoj ĉesis funkcii, kaj homoj pene vivtenas sin per etagrikulturo.

Anseroj kaj azeno

Tamen nova ponto bezonos novan

infrastrukturon, pri kiu mankas detaloj. Por vojaĝi 200 km inter Sofio kaj Vidin necesas preskaŭ kvar horoj. La ŝoseo estas malebena kaj malfacile veturebla: foje surŝoseaj anseroj aŭ azeno paralizas la trafikon. En la rumana flanko, sur la vojon nomatan „Eŭropa Koridoro 4”, dum la rikolta sezono oni surŝutas grenon sur la varmegan asfaltan por sekigi ĝin.

Premo flanke de Eŭropa Unio, kiu per 160 milionoj da eŭroj pleje kontribuos al financado de la projekto, finfine interkonsentigis la najbarajn landojn pri la loko de la ponto. La rumanoj volis, ke la ponto staru tiel, ke trafiko inter Grekio kaj okcidenta Eŭropo pasu tra Rumanio. La bulgarioj volis, ke la ponto troviĝu kiel eble plej okcidente por tiel mallongigi la vojdistancon al Okcidento. Finfine venkis la bulgarioj, kies ideoj pli kongruis kun la ekonomia strategio de la kasistoj en Bruselo.

Gravas ekonomia strategio ankaŭ ambaŭflanke de la Danubo. Laŭ Anelia Georgieva, el la oficejo de la urbestro en Vidin: „Ĉiu niaj esperoj baziĝas sur la ponto.”

Evgeni GEORGIEV/pg



Post la kunsido de financistoj en Prago

De la 26a ĝis la 28a de septembro en Prago okazis la 55a jarkunsido de Internacia Mona Fonduso (IMF) kaj de Monda Banko (MB), kun kunvenoj de ministroj pri financo, fakaj seminarioj, prelegoj, konferencoj, ktp.

Provo de dialogo

Volante eviti bruajn manifestaciojn kaj stratbatalojn fare de la kontraŭuloj de la kunsidoj, kiel jam okazis dum similaj aranĝoj alilande, la ĉeĥa prezidanto Václav Havel invitis al la praga kastelo kaj la reprezentantojn de la financistoj, kaj iliajn kritikantojn. La dialogo okazis je sabato, la 23a de septembro, kaj partoprenis ĝin la gvidantoj de IMF kaj MB kaj iliaj kontraŭuloj, ekzemple la reprezentantoj de la internacia movado *Jubilee 2000*, en kiu estas unuigita aro da ekleziaj organizaĵoj. Laŭ konstato de ĉeestantaj ĵurnalistoj kaj observantoj, la dialogo aspektis kvazaŭ tribunalo, en kiu la demandoj de la kontraŭuloj havis entute negativajn intencojn sen iaj ajn pozitivaj proponoj aŭ racia argumentado. Ne mirinde, ke la respondoj de la prezidantoj de IMF kaj MB povis esti nur ĝeneralaj kaj retorikaj.

Krome, en unu el la seminarioj elpaŝis ankaŭ Bono Vex, la kantisto de grupo U2, kiel reprezentanto de *Jubilee 2000*. „La sola afero, pro kiu la homoj memoros la jaron 2000, estos, ke la riĉaj landoj pardonos la ŝuldojn al la malriĉaj”, li diris. „Doloras nin, kiam ni ekscias, ke en la plej malriĉaj landoj de la mondo mortas ĉiutage dek naŭ mil infanoj pro manko de la baza prizorgo.”

El diversaj landoj venis kelkaj miloj da junuloj por esprimi sian proteston kontraŭ la agadoj de IMF kaj MB kaj kontraŭ la ekonomia tutmondiĝo ĝenerale. La Kongresan Centron ĉirkaŭis vicoj da kirasitaj policianoj, kaj kontraŭ ili staris grupoj da manifestaciantoj. Bonŝance ili estis

konsiderinde malpli multaj ol la atenditaj tridek mil personoj.

La kunsidoj de la financistoj

La 26a de septembro estis la unua tago de la jarkunsidoj de IMF kaj MB. Sub influo de eksteraj manifestacioj la kunsidoj okazis sub la signo de serĉado de vojoj el la monda malriĉeco. Tio koncernas tri miliardojn da loĝantoj de la tero, kaj, se la ĝisnuna evoluo daŭros, ĝi kreskos plu.

La unua parolanto estis prezidento Havel. Laŭ li: „La nuntempa vasta malriĉeco estas unu el la plej videblaj manifestiĝoj de la kontraŭdiroplena civilizo. La sola solvo de tio estas serĉi en ni kaj ĉirkaŭ ni novajn fontojn de reciproka kompreno kaj solidaro, kapablon fariĝi modestaj en la komuna intereso kaj fari ion bonan, eĉ kiam tio ne estas videbla kaj eble eĉ kiam neniu tion aprezas.”

Laŭ la prezidanta sudafrika ministro pri financo, Trevor A. Manuel, la kreskanta proprieta malegaleco prezentas grandan danĝeron por la tutmonda ekonomio. La celo de kresko-strategio estas antaŭ ĉio krei laboreblecojn, sed samgrave estas altiri pliajn investantojn. Sed la inkubo por malriĉaj landoj estas aidoso, je kiu malsaniĝis ĝis nun 33 milionoj da homoj.

La direktoro de IMF, Horst Köhler, konstatis, ke por sukcese batali kontraŭ la malriĉeco necesas ebligi al la evolulandoj liberan aliron al mondmerkatoj. Se la tutmondaj komerc-bariloj duoniĝus, tio alportus al la evolulandoj 110 ĝis 140 miliardojn da usonaj dolaroj (USD) jare. Ĝis la jaro 2015 la nombro da homoj vivantaj en malriĉeco povus duoniĝi. La evoluantaj ŝtatoj al tio devus



kontribui per tio, ke ili energie solvos siajn problemojn, kiel la koruptado aŭ militaj konfliktoj. En la batalo kontraŭ malriĉeco la plej grava afero

estas privataj investoj, kiuj en la plej malriĉaj landoj jam estas enradikiĝantaj.

La prezidanto de MB, James Wolfensohn, opiniis, ke la tutmondiĝo devus esti ilo por akiri la ŝancojn kaj por enviciĝi en la mondan evoluon, do ne por senti timon kaj necertecon. Ne estas en ordo, ke la plej riĉaj 20 % de la monda loĝantaro akiras pli ol 80 % de la tutmondaj enspezoj. Ne estas en ordo, kiam 10 % de la loĝantaro akiras duonon de la nacia enspezo, kiel nun okazas en tro multaj landoj. Samtempe li alvokis la altenspezajn landojn altigi la porevoluigan helpon kaj disponigi tiel la financajn fontojn por pli granda kaj pli rapida redukto de ŝuldoj kaj forigi la komercajn barierojn por malriĉaj landoj.

La nuligo de ŝuldoj de malriĉaj landoj

La Internacia Mona Fonduso kaj la Monda Banko estas ofte kritikataj pro la nekonvena enŝuldiĝo de evolulandoj, kaj estas postulate forstreki iliajn ŝuldojn. La financministroj de membro-landoj de IMF jam esprimis la intencon nuligi la plejmulton de la ŝuldoj de la dudek plej mal-



riĉaj landoj. La senŝuldiga programo post ioma tempo disvastiĝos al 41 landoj.

La nuligo de ŝuldoj estis unu el la ĉefaj temoj de la praga Jarkunsido de la estraroj de IMF kaj MB. Oni intencas forstrecki du trionojn de la ŝuldoj, kio alportus centmilionojn da dolaroj, kiujn la registaroj utiligus por redukti la malriĉecon kaj por plifortigi socialajn programojn.

Sed la programo renkontas kritikon de precipe neregistaraj organizaĵoj, ĉar ĝi estas ligita al pluaj programoj de laŭstrukturaj modifoj, kies „klara interligo kun la pliprofundigado de la malriĉeco jam estas pruvita”. Laŭ la kritikantoj montriĝas, ke tio ne kondukas al redukto



de ŝuld-elspezoj, kaj ke en kelkaj landoj male la situacio ankoraŭ plimalboniĝis. La ŝuldanteco de landoj de la tria mondo laŭ ili altiĝas, okazas kriza redukto de elspezoj por la sociala sekurigo, sanprotektado kaj lerneja sistemo. En la landa ekonomio superregas eksportado, kio kaŭzas nepran malstabiligon de la ekonomio.

La ŝuldo de la 41 plej enŝuldiĝintaj landoj nun atingas 75 miliardojn da USD, kaj jam en la jaro 2000 devus esti forstrekita ŝuldoj je valoro de 30 miliardoj. Sed la ŝuldantaj landoj devas akcepti aron da politikaj kaj ekonomiaj reformoj, kiuj garantias, ke la nove akiritaj financoj ne estos disipitaj. La landojn por la senŝuldiga programo oni pritaksas en du fazoj: unue ili devas pruvi la kapablon singardeme mastrumi per la subvencioj en la kadro de apogprogramoj, kaj en la dua fazo ili devas redukti la malriĉecon. La programo estis jam ratifita por Benino, Bolivio, Burkino, Honduro, Malio, Maŭritanio, Mozambiko, Senegalio, Tanzanio kaj Ugando, kaj ĝis la fino de la jaro 2000 ĝi validos ankaŭ por Ĉado, Gambio, Gujano, Gvineo, Gvineo-Bisaŭo, Kameruno, Malavio, Nikaragvo,

Ruando kaj Zambio. La ceteraj enŝuldiĝintaj landoj (ĝis la nombro 41) dume ne estas enprogramigitaj pro militaj konfliktoj, interna malstabileco, anarkio aŭ pro regantaj militistaj klikoj en tiuj landoj.

Konklude eblas konstati, ke la traktadoj de IMF kaj MB celis formuli la novan rolon de ambaŭ institucioj en la tutmondiĝa procezo sur la sojlo de la 21a jarcento. Ekzemple, dum la MB pli frue aplikadis la novliberalan politikon de persista privatigo kaj liberaligo, kio en pluraj landoj kondukis al ekonomia kolapso, nun oni komencas kompreni, ke necesas strategio celanta al la kvalito de la kresko kun emfazo sur la utiligo de la homa kapitalo, la respekto plena rilato al la naturo kaj la klerigo. La nova rolo de IMF kaj MB devas baziĝi sur la nova financa sistemo sufiĉe efika por la problemoj de la tutmonda ekonomio. Devus formiĝi tiaspeca reguliga aparato, kiu ebligus la ekonomian disvolviĝon, sed samtempe limigus ties negativajn manifestiĝojn, kiel ekzemple la neregeblan potencon de iuj supernaciaj kompanioj.

Stratbataloj vekis antipation

La plenkunsido de IMF kaj MB tamen finiĝis pli frue ol planite, jam je merkredo, la 27a de septembro, kaj la ĵaŭdo estis dediĉita al gazetaraj konferencoj. Financistoj preferis forlasi Pragon pli frue, ĉar ĉirkaŭ la Kongresa Centro iuj manifestaciintoj atakis policianojn.

La provokoj kaj atakoj komencitaj je la 26a de septembro posttagmeze havis similan evoluon kiel alilande. Oni frakasis fenestrojn de kelkaj bankoj kaj la montrofenestrojn de du McDonalds-rapidmanĝejoj sur la Venceslaa Placo. Interese, ke deko da aliaj Donaldoj tra Prago estis netuŝita. Sed okazis ankaŭ atakoj kontraŭ simplaj loĝantoj de la urbo. Ĉe praganoj tio vekis malamikan humoron kontraŭ la agresemaj manifestaciintoj, tiom pli, ke iuj ital- kaj hispan-lingvaj trupoj disfaldis ruĝajn flagojn kun kvinpintaj steloj kaj simboloj de martelo kaj serpo. Ĉeĥoj satspertis tiujn simbolojn dum kvar jardekoj, kaj neniam plu ili volus havi ilin denove. La agresemaj radikaluloj tial ne nur ne sukcesis ĥaosigi aŭ malebligi la traktadojn de financistoj, sed samokaze ili perdis la simpation de la ĉeĥa socio. Estas bedaŭrinde, ke la origine pacemaj radikaluloj tiamaniere disipis sian idean kapitalon. La homoj, kiuj komence simpatiis kun ili, baldaŭ trovis, ke ne la vandaloj, sed la financistoj pravas. Ĉeĥa politikisto pri tio diris: „La mondo sen IMF kaj MB estus la mondo de lupoj.”

Jiří PATERA



Matsumoto Kiyoshi atingis Ginza, la plej prestiĝan komerckvartalon de Tokio.

JAPANIO

Ginza

Ĉenoj de vendejoj, kiuj vendas malaltpreze medikamentojn, kosmetikaĵojn, ktp, laŭ modelo de usona *drugstore*, apartenas al la plej kreskantaj branĉoj de la japana komerca mondo. Matsumoto Kiyoshi estas la plej granda tia ĉeno kun ĉ. 500 filioj en kaj ĉirkaŭ Tokio. Sed al ĝi mankis filio en Ginza, la plej fama kaj prestiĝa komerckvartalo de Tokio. Fondi tie filion aspiras ĉiuj ajn detalistoj.

Lastatempe Matsumoto Kiyoshi sukcesis malfermi tie filion, sed samtempe ankaŭ establis sin Boots [buts], ĉeno kun mil kaj kelkcentoj da filioj en Britio. Kio rezultos el ilia konkurenco?

IGARASI Takeo

Energia katastrofo

La ekonomia situacio de Albanio daŭre estas malfacila. En la aŭtuno de 2000 oni travivas energian katastrofon, ĉar – kontraste al aliaj eŭropaj landoj – ne pluvis sufiĉe. Tial la generatoroj, kiuj ĉefe uzas akvofalan energion, ne povas funkcii je sia normala kapacito. Mankas elektra kurento dum po 14 ĝis 16 horoj tagnokte.

Bardhyl SELIMI

ĈEĤIO

La mezepokaj judaj mortintoj fine trankvilaj

La londona „Komitato por la savo de judaj tombejoj en Eŭropo” prezentis plendon al la Eŭropa Kortumo de Homaj Rajtoj en Strasburgo pri la afero de judaj tomboj en Vladislavova Strato en Prago. „Ni insistas ĉe la ĉeĥa registaro, ĉe la ĉeĥaj civitanoj kaj ĉe la internacia komunumo pri haltigo de tio, kion mi povas nomi ŝtate regata vandalismo”, diris rabeno Abraham Pinter.

Pri kio temas?

Iuj eksterlandaj legantoj eble timas, ke estas endanĝerigita la fame konata malnova juda tombejo en la juda urboparto de Prago. Sed tiu ĉi tombejo, ĉiutage vizitata de miloj da turistoj, neniel estas endanĝerigita kaj plu restas perlo de Prago.

Temas pri tute alia tombejo, pri la plej malnova juda tombejo en Eŭropo, menciita jam en la jaro 1253. Pro la kreskado de la tiama urbo, la ĉeĥa reĝo Vladislavo Jagelono ordonis en 1478 likvidi la tombejon kaj ŝanĝi ĝin en konstruparcelojn. Dum jarcentoj estis konstruataj domoj sur tiu ĉi loko, ambaŭflanke de la strato, kiu portas la historian nomon Vladislavova honore al reĝo Vladislavo. Fine de la 19a jarcento ambaŭflanke de Vladislavova Strato estis konstruitaj multetaĝaj domoj.

En 1997 la Ĉeĥa Asekur-Kompanio (ĈAK) komencis tie konstrui novan domegon kun du subteraj etaĝoj por garaĝoj. Estas interese, ke la praga Instituto por Memoraĵ-prizorgado komence rifuzis doni permeson por la konstruado en Vladislavova Strato, ĉar tie troviĝas restaĵoj de la iama juda tombejo. Sed poste iel okazis, ke ĈAK tamen ricevis la permeson. Kaj tial la konstrulaboroj komenciĝis, sed en 1998 ili estis interrompitaj, ĉar oni efektive trovis korporestaĵojn el la iamaj tomboj. Arkeologoj tuj komencis esplori la trovaĵojn. Ili elterigis 160 korporestaĵojn sur terpeco 40 metrojn longa kaj 10 metrojn larĝa. La korporestaĵoj estis fake esploritaj kaj

konservitaj en la Instituto por la Memoraĵ-zorgo. Laŭ normalaj kutimoj la trovitaj korporestaĵoj estus pie enterigitaj en iu funkcia tombejo, kaj la konstrulaboroj povus senĝene daŭri plu. Sed ĉi-okaze estis alia afero, ĉar temis pri la plej malnova juda tombejo de Eŭropo!

La serĉado de akceptebla solvo

Pri la problemo de la malkovritaj tomboj traktis ĈAK kun la ministrejo pri kulturo kaj kun judaj religiaj rondoj sufiĉe longe. Dume la supera landa rabeno, Efraim Sidon, ricevis leteron de la supera israela aŝkenaza rabeno, Jisrael Mair Lau, kiu rifuzis ian ajn eblon de konstruado sur la loko de la tombejo. Laŭ Sidon estas nepermeseble konstrui super, sur aŭ sub ili.

Post longaj diskutoj kaj serĉadoj de kultura solvo de la problemo, pri la afero fine komencis okupiĝi ankaŭ la ĉeĥa registaro. En marto 2000 ĝi decidis, ke la 40-metra areo kun la tomboj estos ĉirkaŭbetonita en formo de iuspeca sarkofago kaj restos en sia loko, sed ĝi fariĝos konsistaĵo de la nova konstruaĵo. La tombo-loko estis proklamita nacia kultura memoraĵo. La ŝanĝo de la projekto kaj de la konstrulaboroj kostos cent milionojn da ĉeĥaj kronoj, por kio la registaro disponigos 45 milionojn el la ŝtata buĝeto. La ceteron pagos la asekur-kompanio. Cetere, ĝi jam perdis cent milionojn pro la interrompo de la konstrulaboroj.

Prago: la malnova juda tombejo.



Unu tagon poste la registara decido estis anoncita en aparta kunveno de reprezentantoj de la registaro, de ĈAK, de la praga juda komunumo, de la usona ambasado kaj de Komitato por Konservado de la Usona Heredaĵo en Eksterlando. La ĉeestantaj partioj esprimis sian aprobon pri la decido de la ĉeĥa registaro. Ankaŭ reprezentantoj de la usona juda komitato aprezis la kompromison, ke la korporestaĵoj estos konservitaj en neŝanĝita pozicio.

Tamen aperis problemo koncerne la revenon de la korporestaĵoj elprenitaj por arkeologiaj esploroj. La praga juda komunumo insiste postulis, ke la enterigo de la restaĵoj okazu kun religia ceremonio, sed tion kontraŭstaris la estroj de ĈAK, ĉar laŭ la judaj religiaj reguloj ĉiu tombo devus havi difinitan ĉirkaŭspacon, kio postulus pligrandigi la terblokon kun la tomboj. Ankaŭ laŭ la ministro pri kulturo ne eblas per religiaj ceremonioj renovigi tombejon likviditan jam antaŭ kvincent jaroj.

Do, kvankam la afero estis solvita per la registara decido aprobita de enlandaj kaj eksterlandaj judaj reprezentantoj, tamen okazis, ke kvardeko da eksterlandaj ortodoksaj judoj kunvenis antaŭ la konstruloko en Vladislavova Strato, ĝuste kiam estis reenterigitaj la korporestaĵoj esploritaj de arkeologoj. Laborantoj de ĈAK malebligis al ili enpaŝi la konstruejon pro sekurecmotivoj, kaj la korporestaĵoj ne



estis enterigitaj, sed dume provizore lokitaj en la pietat-salono de la nova juda tombejo.

Eksterlandaj protestoj

Jam dum la traktado pri konservado de tomboj en Vladislavova Strato okazis manifestacioj de ortodoksaj judoj antaŭ la ĉeĥaj ambasadoj en Londono kaj Bruselo. La manifestaciintoj, venintaj por preĝi kaj rememori la mortintojn, petis, ke la ĉeĥaj aŭtoritatoj baldaŭ solvu la aferon. Tamen pro diversaj kialoj la plenumo de la registara decido estis prokrastita, kio maltrankviligis reprezentantojn de eksterlandaj judaj organizaĵoj. „La sola ebla vojo por ni estas publi-

ka protestado ĉe ĉeĥaj ambasadoj”, avertis en sia letero la direktoro de la Komisiono por Konservado de Eŭropaj Judaj Tombejoj en Londono, rabeno Abraham Ginsberg. Kaj li aldonas: „Ĝi estos protesto de la hebrea nacio kon-

traŭ tiu ĉi rompado de homaj rajtoj kaj religiaj liberecoj.”

La 24an de julio la usona ambasadoro en Prago, John Shattuck, dum sia kunveno kun la ĉeĥa ministro pri kulturo, Pavel Dostál, esprimis averton, ke la eventuala neplenumo de la judaj postuloj koncerne la likviditan tombejon en Vladislavova Strato povas havi „malfavorajn internaciajn kaj komercajn sekvojn” por la ĉeĥa respubliko. La parolanto de la usona ambasado klarigis, ke Usono kredas, ke la daŭrigo de la diskuto inter la partoprenantaj partioj helpos solvi la restantajn demandojn.

Laŭ eldiro de la ĉeĥa ministro pri eksterlandaj aferoj la ĉeĥa respubliko respektas la starpunkton de Usono, sed la solvo de la konflikto pri la mezepoka juda tombejo estas nemiskompreneble interna afero de ĈAK, de la praga juda komunumo kaj de la ĉeĥa registaro.

La Ĉeĥa Asekur-Kompanio daŭrigas plu la konstrulaborojn kaj opinias, ke por ĝi la sola aŭtoritata dokumento estas la marta decido de la registaro. Laŭ la ministro pri kulturo, la asekurkompanio „kontribuis al solvo akceptebla por ĉiuj interesiĝantaj partioj. Bedaŭrinde en la traktadoj kun judaj organizaĵoj denove ripetiĝas tio, ke oni ion interkonsentas, sed tuj poste tio ne plu validas.”

Dume, eksterlandaj rabenoj rifuzis la registaran decidon konservi la restaĵojn de la iama tombejo en la neŝanĝita loko en formo de sarkofago kaj kiel par-

to de la konstruaĵo de la asekur-kompanio. Laŭ ili tio signifas kompletan ne-niigon de la tombejo, ĝian ŝanĝon en betonblokon kaj profanadon de la rajtoj de la mortintoj.

Fina solvo bona, ĉio bona

Ŝajnas, ke la lasta solvo de la afero, kiun prezentis la praga juda komunumo, estas vere la fina. La komunumo decidis, ke la elterigitaj korporestaĵoj estos enterigitaj kun religia ceremonio en la nova juda tombejo kaj malakceptis la premon flanke de eksterlandaj ortodoksaj grupoj, postulantaj renovigon de la tombejo, likvidita antaŭ kvin jarcentoj. Samokaze la komunumo rifuzas iujn ajn provojn pri plendoj antaŭ tribunaloj. Kaj la betonan sarkofagon de la konstruaĵo de ĈAK ĝi komprenas kiel kompromison konservantan la tombojn trovitajn sur la konstruejo.

Laŭ ĉeĥaj politikistoj la juda plendo al la strasburga tribunalo estas senbaza, ĉar la konstruado okazas akorde kun la enlanda juro. Cetere la rabena plendo devus koncemi ĉiujn konstruaĵojn ne nur en Vladislavova Strato, sed ankaŭ en la stratoj najbaraj.

La decido de la praga juda komunumo sekve prezentas prudentan kompromison kaj bonan solvon de la afero, kiu tiom ekscitis iujn eksterlandajn judajn rondojn, ofte nebone informitajn.

Jiří PATERA

STATISTIKO

Du miliardoj da kristanoj tutmonde

Laŭ diskonigita statistikaĵo de la usonaj religiaj statistikistoj David B. Barrett kaj Todd M. Johnson [ĝonsn] la monda kristanaro en la jaro 2000 superos la nombron de du miliardoj. Sekve de tio oni povus konstati, ke triono de la monda loĝantaro konfesas kristanismon.

Ĉirkaŭ 20 procentojn (1,2 miliardoj) nombras la islamanoj laŭ la menciita statistikaĵo, sekvataj de hinduoj (811 milionoj), „nekredantoj” (768 milionoj), budhistoj (360 milionoj), anoj de religioj indiĝenaj (228 milionoj), ateistoj (150 milionoj) kaj judoj (14,4 milionoj). Tiuj kalkuloj estas kontestataj, ĉar plej ofte nur la eklezioj faras pli ĝustajn statistikojn – sed ankaŭ ne ĉie. Ekzemple, en islamana sfero ĉiuj personoj, kiuj havas difinitan kulturalan apartenecon, estas konsiderataj „islamanoj”, kaj el ili multaj eĉ ne vidis moskeon deinterne. Tio validas ĉefe por la mez-azia kaj nord-afrika regionoj.

La plej multaj kristanoj laŭ la donitaĵoj de Barrett kaj



Johnson loĝas en Eŭropo (537 milionoj). Sekvas la kristanoj en Latin-Ameriko (476 milionoj), Afriko (335 milionoj), Azio (307 milionoj), Nord-Ameriko (212 milionoj) kaj Oceanio (21 milionoj). La katolika eklezio havas pli ol unu miliardon da anoj – pli ol la duonon de la kristanoj en la mondo. Al la protestantaj eklezioj apartenas laŭ la statistikaĵo 342 milionoj, al la ortodoksaj 215 milionoj kaj al la anglikanaj 80 milionoj da

homoj. La ceteraj kredantoj dividiĝas je „sendependaj eklezioj”.

Barrett kaj Johnson indikis krom tio, ke malgraŭ ĉiuj provoj en la 20a jarcento unuigi la kristanaron, la skismo de la konfesioj nur pliiĝis kaj profundigis. Se en la jaro 1900 estis 1 880 eklezioj kaj ekleziaj komunumoj, ili hodiaŭ jam estas 33 800. La pliiĝo koncernas ĉefe la protestantan sferon – kaj tie ĉefe la tiel nomatan „evangelizadan” tendencon.

Evgeni GEORGIEV

PENTRADO

„Mia ateliero estas mia ĝardeno”

Multloke en la mondo artemuloj festas nuntempe la verkaron de la kataluna artisto Joan [juán] Miró, laste, subtene al la koncerna aŭtonoma hispania regiono, en la hungara ĉefurbo Budapeŝto. Sed ankaŭ en la muzeo de Ludwigshafen (industria urbo en la sud-okcidento de Germanio, konata pro la firmao BASF, apud la rivero Rejno) oni honoris la pentriston per ekspozicio en ĉeesto de pli ol 1500 personoj.



Unu el la plej grandaj bildartaĵoj de la mondo, fieraĵo de Ludwigshafen.

Certe ne nur la renomo de la artisto allogis tiom da homoj. Aldoniĝas plia kialo: en 1979 Miró plenumis la peton ornami per ceramikaĵoj la sudan muron de la muzeo. Tiam jam malsana, li tamen desegnis la originalaĵojn, kiujn lia

samlanda kunlaboranto Joan Gardy Artigas fiksis meti-artece sur kahelojn. Tiel ekestis unu el la plej grandaj (10 oble 55 m) bildartaĵoj de la mondo, fieraĵo de Ludwigshafen kaj de la paginta firmao BASF.

Dum la nuna ekspozicio de la bildoj de Miró oni prezentas pli ol 130 verkojn el ĉiuj liaj kreaĵoj. Ĉe la malfermo paroleme abundis urbaj, ŝtataj, subtenaj reprezentantoj, aŭdiĝis nova kataluna muziko. Ĉeestis ankaŭ la nepo de Miró, videble jam sperta en internaciaj komercaj traktadoj.

La superrigardo pri la verko de Joan Miró, pri la verkado dum pli ol duona jarcento, rigardeblas almenaŭ ĝis la fino de februaro 2001 en la muzeo de Ludwigshafen.

Franz-Georg
RÖSSLER



Tiujn ĉi teatrajn figurojn Miró ornamis per balailoj, brosoj kaj ŝprucboteloj.

MUZIKO

Ĉarmaj kantoj por infanoj

Kantojn por infanoj karakterizas verŝajne la samaj ecoj ĉie en la mondo: la melodio estas relative simpla, la ritmo danc-instiga, kaj




koncerne la tekston, ĝia sonkvalito gravas pli ol la enhavo. Ne mirindas ke ankaŭ la kantoj de „Ni dancu en la rondo” respondas tiujn ĉi antaŭkondiĉojn. La temoj estas same universalaj: pri kverelo, puno, reamikiĝo („Vergon ĵetis mi, Ĉe mi Bitu”), pri muzikiloj („La vendejo de sinjor’ André”), amkantoj („Bufo Kururu”; „Al Tororo”, „Dronis la boato”, Sur ĉi strato”); ankaŭ militista kanto („Marŝu soldato”) kaj preĝeto („Ho fratineto”) ne mankas. Konata melodio en Flandrio kaj Nederlando estas tiu de la kanto „La bela Rozo junulin”, kvankam la teksto estas tute malsama – ĉu eble temas pri internacia/universala melodio?

Tio pruvas ke ankaŭ la muziko respondas la tipajn porinfanajn ecojn. Sian propran karakteron la kantoj de tiu ĉi disko tamen ankaŭ kunportas, fojfoje la muziko estas vigla, foje iom trena – laŭ brazila stilo. Iom ĝena tamen estas la tro stereotipa aŭtomata akompanado helpe de modernaj teknikaĵoj, ne muzikiloj sed sonsinteziloj.

La tekstlibreto estas bele prizorgita kun desegnaĵetoj en la fono de la tekstoj kaj indikoj pri la akompanaj agordoj. Konklude ni povas prijuĝi la KD-on jene: kompakta disko kun kantoj por infanoj ĝis, ni diru, sesjaraĝaj. Ĝia nivelo estas komparebla al tiu de samspecaj nacilingvaj (almenaŭ flandraj/nederlandaj) kasedoj aŭ diskoj. Ĝi do estas riĉigo de la stokado de porinfanaj lingvaj amuziloj.

Guido VAN DAMME

Ni dancu en la rondo. Brazilaj kantoj por infanoj. Tradukis Jorge Teles; kantas Flávio Fonseca kaj Cristina Pancieri. Eldonis: Brazila Esperanto-Ligo. Prezo ĉe FEL: EUR 16,00 + sendokostoj.



BACH 2000

Finiĝis la Bach-jaro

Johano Sebastiano Baĥo (nacilingve Bach) en 1750, la jaro de sia morto, ne povis fini sian lastan verkon, „La arto de fugo”. Hodiaŭ oni povas nur supozi, kiagrade la tuto estas finita. Sed ĝi ricevis signifon kaj dignon per okazaĵo, kiun la filo Karlo Filipo Emanuelo Baĥo notis fine de la nefinita partituro tiel: „Super tiu ĉi fugo, tie, kie estas notita la nomo 'Bach' en la kontrasta temo, mortis la aŭtoro”. Fakte, tiel „signis” la granda komponisto sian lastan verkon. Kompreneble la notado ne okazis per literoj, sed per muziknotoj akurate bildigantaj la nomon Bach.

Ne ĉiu muziknotsistemo tion ebligas, sed la germana metodo nomi la muziksignojn – jes. Laŭ ĝi ĉiu litero de la nomo Bach rilatas al certa muziknoto. Baĥo antaŭe tre ŝpareme utiligis tiun sigelon, sed konscie kronis sian lastan verkon per ĝi. Estas ĉiam emociige aŭskulti la fragmenton, precipe fine, kiam post la eksono de la fama nomo la lastaj tonoj malaperas en eterna silento, kvazaŭ la morto ĉi-momente forprenus plumon el la mano de la aŭtoro.

Post la morto Baĥo malaperis el konscio de la granda muzika mondo, sed reaperis triumfe en 1829 per postlongatempa prezentado de la „Pasiono laŭ Mateo”. Jam Betoveno laŭdegis sian antaŭulon per la diraĵo: „Lia nomo ne estu Bach ('rivereto' en la germana lingvo), sed maro!” Li eĉ planis verki uverturon pri ĉi tiu nomo. Bedaŭrinde li ne povis realigi tion, sed multaj postaj komponistoj verkis pecojn omaĝe al Baĥo, utiligante la kvar muzikajn literojn. Ankaŭ la nuna memorjaro estiĝis aron da tiaj verkoj. Tiel ducent kvindek jarojn post la morto de tiu unika komponisto oni daŭre aŭskultas ne nur muzikon de li, sed ankaŭ verkojn dediĉitajn al li kaj inspiritajn de lia muzika potenco kaj de lia nomo.

Franz-Georg RÖSSLER


La Bato (Lena Karpunina)

La evidente propraj travivaĵoj de la aŭtorino estas tre interesa legaĵo. Ŝi rakontas ilin laŭ bona, vigla stilo. La enhavo agrable varias kaj la lingvo-uzo taŭgas (Rejna De Jong). Mi konstatis kun plezuro, ke jen aŭtoro kiu regas la verbon! (...) Tamen ĝi estas merita kolekto pro ĝia humaneco, alikultureco kaj psikologia fono (Chris Declerck).


Paĝoj; 128; 21 cm; kudre bindita; 2000.
Serio Stafeto, n-ro 26.
ISBN 90 71205 87 8.

Prezo: 12,00 €

NOVA!



Simptomoj (Gonçalo Neves)



Post „Ibere libere” kie Gonçalo Neves sukcese elpaŝis kun siaj poemoj, jen „originala poemaro senprefaca” plume nur de li.

Paĝoj: 72; 21 cm; vinktita; 2000.
ISBN 90 71205 86 X


Prezo: 8 €


Nomoj (Johan Hammond Rosbach)

Nomoj estas aro da travivaĵoj, kiujn la aŭtoro spertis en Norvegujo, Italujo, Madejro, ..., kie li renkontis diversajn, ofte strangajn personojn.

Paĝoj: 76; 21 cm; vinktita; 2000.
ISBN 90 71205 83 5

Prezo: 8 €





TRADICIOJ

Bierlando Belgio

En Belgio estas multaj bierspecoj. Eĉ tiom multaj, ke ĉiutage en la jaro oni povus trinki aliaspecan bieron, ĉiufoje en speciala bierglaso!

Kial Belgio havas pli da lokaj (regionaj, urbaj, abatejaj) bierspecoj ol la najbarlandoj? Kaŭzoj por tio estas la kompleksa intermiksiĝo de klimataj, historiaj, mikrobiologiaj kaj eĉ burgundiaj faktoroj.

Klimato

En la malvarma nordo de okcidenta Eŭropo simple kreskas malmulte da vinberoj. Tial en Belgio oni ĉiam sin dediĉis al la kultivado de grenoj. Speciale hordeo kaj tritiko bone kreskas sub tiu klimato.

Historio



En la mezepoko biero estis likva pano: manĝaĵo kaj trinkaĵo samtempe. La virino bakis panon kaj faris bieron.

La unuaj tavernistoj en siaj farmbienoj-bierfarejoj mem produktis bieron por vojaĝantoj, kaj la restaĵoj rezulte de tio servis kiel furajo. Abatoj plenigis sian kason per la biervendado.

Trinki bieron estis pli sekure ol trinki akvon, ĉar la boligo mortigis la bak-

teriojn. Do, ekde la 17a jarcento bierfarejoj kaj distilejoj fondiĝis en „Liberaj urboj” kiel Hoegaarden [húgarden] kaj Lembeek, kie oni ne devis pagi akcizojn.

La origino de multaj belgaj bierspecoj kaj ilia gustvarieco venas de la jaro 1364, en kiu la germana imperiestro Karlo 4a deklaris novan bierleĝon, la „Novus Modus Fermentandi Cervisiam” (Nova maniero fermentigi bieron). Laŭ ĝi la uzado de lupolo iĝis deviga en Brabanto. Kontraste al tio en graflando Flandrio, kiu estis sub la regado de franca reĝo, la bierfaristoj estis



devigitaj uzi aliajn herbojn ol lupolo.

La uzo de lupolo plibonigas la bierkvaliton. Antaŭe estis nur spontanea kaj miksa fermentado (altaj gistoj kun bakteria flaŭro). La bakterian kreskon kaj do ankaŭ la difektiĝon specife brem-
sas lupolon. Tiel la pura gistflaŭro povis superregi kaj sekve pliriĉigi la guston, pro kio la gistaj bierspecoj iĝis tipe
brabanta specialaĵo.

Certaj regionoj en Belgio havas propran, lokan mikrobiologian medion. Speciale en la valo de la rivero Zenne koncentriĝas „sovaĝaj gistoj” en la aero, kiel „*Brettanomyces lambicus*”, kiuj interalie mildigas la acidan guston.

Burgundio

La prefero de belgo bone manĝi kaj trinki trovas sian originon en la „Ora” 17a jarcento de Flandrio. Tiam pro la gusto ĉiu urbo havis sian preferon rilate proprajn herbomiksaĵojn aŭ „grión” (en kiu



enestis i.a. miriko, rosmareno, koriandro, junipero, cinamo, anizo, kariofilo, salvio, laŭro). Ĉiu bierfaristo estis devigata aĉeti herbojn en la loka „herbodomu”.

En Bruĝo oni povas daŭre viziti la tiel nomatan *Gruuthuuze* kiel ekzemplon de la kreskanta urba povo, interalie akirita danke al la ekstraj akcizoj (ĝis 60 aŭ 70 centonoj de la urbaj enspezoj). Urboj kaj lokaj biergildoj reguligis la vendoprezojn, ingrediencojn kaj preparmanieron. Tiel la urba bierarto pliperfektigis kaj urbaj bierspecoj ekestis. Ekzemple, en Bruĝo en la 16a jarcento funkciis bierfarejo *‘t Hamerken* (la marteletu) – nun *De Gouden Boom* (la ora arbo), – kiu produktis la urbobieron

Brugse *Tripel* (bruĝa triobla, t.e. kun trioble da ingrediencoj).

La termino *Tripel* estis en Bruĝo ĉefe uzata por indiki kutime palan bieron de 6 ĝis 9 alkoholgradoj. Hodiaŭ, *Brugse Tripel* estas unu el la maloftaj bierspecoj, kiu 3 jarojn sinsekve estis honorata per ora medalo de *Monde Sélection*, kaj ankaŭ per la trofeo de alta internacia kvalito. Karakteriza estas ĝia kremeca malto kaj mieleca gusto, kaŭzata de multe da alkoholo (9,5%), kun refermentado post enboteligo.

Ĉi-supraj elementoj klarigas la evoluon de la diversaj belgaj lokaj (regionaj, urbaj, abatejaj) bierspecoj, inter kiuj multaj unikas en la mondo kaj pro tio estas parto de la homara heredaĵo.

Superrigardo

Ĉi-sube vi trovas superrigardon de la plej gravaj belgaj bierspecoj, ordigitaj laŭ la fermentadprocedo: alta (aŭ varma), malalta (aŭ malvarma), spontanea kaj miksa fermentado.

Malalta fermentado:

Pilsena biero

Unuafoje produktita en Pilsen (Ĉeĥoslovakio, 1842), la pilsena biero aperis en Belgio ĉirkaŭ 1928, ankaŭ danke al la progreso de fridtekniko. Post jarcentoj de malhelaj (varme fermentintaj) bierspecoj, tiu orkolora (malvarme fermentinta) biero kun averaĝe 5 alkoholgradoj gajnis popularecon pro tio, ke ĝi malpli pezis, pro siaj klareco kaj sensoifiga efiko. Kune kun lupolo, la malalta temperaturo brem-
sas la bakterian kreskadon, pro kio la biero iĝas pli klara.

Tamen la sukcesplena ekflorado de pilsena biero estis ja mallongdaŭra, mezurita laŭ historia skalo. Nur kvardek jarojn poste, ĉirkaŭ 1968, la pilsenbiera konsumado en la belga merkato kulminis je 90 procentoj (la ceteraj 10 procentoj konsistigis specialan bieron). Ekde 1968 (la studenta revolucio) la specialaj bierspecoj ĝuas restariĝon sub influo de la pli kritikema konsumanto, kiu en mondo de gusto-egaliĝo kaj industriiĝo sin turnas al la gustvarieco de la naturo. Dudek jarojn poste, la speciala biermerkato triobliĝis kaj atingis 30 procentojn: la reveno de burgundaj biergustoj fariĝis fakto kaj ekspansias al la najbar-



landoj de Belgio. Ankaŭ malaperintaj bierspecoj kiel tritiko- kaj herbobieroj (blankaj bieroj) reakiras intereson.

Alta fermentado:

Tiu ĉi „supre flosanta” varma (aŭ alta) fermentado havas pli fruktecan aromon ol la biero de malalta fermentado kaj estigas pli kompletan, pli dolĉan guston. Kontraste al la pilsena biero, fridinstalaĵoj ĉi-kaze superfluas.

Speciala belga tipo

La nomo „*Spéciale Belge*” estis unuafoje uzata fine de la dudekaj jaroj de 20a jarcento dum la ekfuroro de pilsena biero, referencante al la belgaj alt-fermentadaj bierspecoj kun ĉirkaŭ 5 alkoholgradoj, leĝere lupolizita kaj farita el helkoloraj maltoj de apudmaraj hordeoj. Populare oni ankaŭ parolas pri ambrokoloraj bierspecoj, el kiuj „*Palm*” estas la plej populara. Produktita laŭ la infuzmetodo, ĝi havas plenuŝan, amardolĉan guston de malto kaj fruktecan aromon. La dua fermentado (aŭ maturiĝprocedo) fajnigas la guston kaj atribuas pli da mildeco al la biero.

Blanka biero (tritikbiero)

La origino de blanka biero estas ĉirkaŭ la 14a jarcento en Orienta Brabanto. Tritiko, aveno kaj betoj estas de plej frua epoko tie kultivataj en la grandbieno.

Tiu intensa kultivado postulis multe da fortoj de homoj kaj ĉevaloj, ambaŭ tre soifaj post longa tago da peza laboro. En la grandbieno oni faris la sensoifigan blankan bieron el ĉirkaŭ 50 procentoj da nemaltigita tritiko, pro tio estas ties lakteca, natura malklareco. Aldono de fortaj gustigaĵoj kiel koriandro kaj kuracao estigis al la tritikaj bierspecoj herban kaj freŝan, acid-dolĉan guston. La plej konataj markoj estas interalie *Brugs Tarwebier* kaj *Hoegaarden*.

Trapistaj, abatejaj kaj monaĥaj bieroj

Trapista biero devas esti farita ene de la muroj de trapista monaĥejo kiel en Westvleteren. La nomo estas laŭleĝe protektata kaj havas kiel etikedon „*authentic Trappist product*” (aŭtentika trapista produkto), kiu ankaŭ protektas aliajn trapistajn produktojn kiel ekzemple fromaĝon.

Abateja biero estis produktata ekster la monaĥejoj sub licenco de monaĥeja komunumo. Ĝi ne estigis apartan bierspecon, kutime havas altan alkoholenharon inter 6 kaj 12 gra-

doj, kaj povas esti blonda aŭ malhela, refermentinta en botelo kun amardolĉa, milde rostita gusto.

Ekzistas nur 6 abatejoj, kiuj solaj en la mondo rajtas produkti trapistan bieron. Unu situas en Nederlando (La Trappe), kaj la kvin aliaj en Belgio: Westvleteren, Westmalle, Chimay, Orval kaj Rochefort.

Pezaj, blondaj bieroj

Karakteriza pri la blondaj bieroj de alta fermentado estas la alta alkohol-enhavo (pli ol 6 procentoj). Arto kaj lerto kulminas en la „virtuozaj” bieroj kiel „Duvel” (diablo, 8,5 procentoj), nesuperita en ĝia speco. „Duvel”, refermentinta en botelo, havas fajrere oran koloron kaj abundan ŝaŭmkolon. La ekvilibro inter fajna aromo kaj subtila amareco donas al tiu ĉi biero unikan lokon en la riĉa belga biertradicio.



Britaj bieroj

Sub influo de ambaŭ mondmilitoj, belgoj ankaŭ ekkonis la anglajn, skotajn kaj irlandajn bierspecojn (elojn). Tipa por la multaj britaj bierspecoj estas „dry hopping” (oni aldonas freŝan lupolon dum dua fermentado). *Pale ale*, *stout* kaj *scotch ale* estas la plej konataj specoj.

Sezonaj bieroj

Origine *saisons* (sezonaj bieroj) estas faritaj en la riĉaj farmbienoj-bierfarejoj de Henegovio dum la vintraj monatoj, por ke oni post la maturiĝo trinku ilin dum la rikoltmonatoj.

Tipa por la sezonaj bierspecoj estas la alta pastotemperaturo de la malto, pro kiu ekestas ekstra nefermentigebla sukero. Post la ĉefa fermentado tradicie venas la varma fermentado kaj „dry hopping”. Fermentado en la botelo zorgas pri pli multe da karbondioksida gaso, kio kaŭzas pli refreŝigan kaj pikan guston.

Spontanea fermentado:

Lambikaj, geŭzaj kaj fruktaj bierspecoj

La nomo Lambiko referencas al la loko Lembeek sude de Bruselo, en la valo de la rivero Zenne. Tie en la aero flugas sovaĝaj gistoj kiel *Brettanomyces bruxellensis* kaj *lambicus*. Ili spontanee ĝermas en la

sukerita maltpasto en malferma, frida kuvo, kiu troviĝas sub vento-trablova tegmento. Jam en la 16a jarcento oni skribis, ke Lambiko devas esti farata per nemaltiĝinta tritiko, aveno kaj hordea malto, kun aldono de plurjara (malpli amara) lupolo. La kombino de la spontanea gisto kun la ingrediencoj estigas al la Lambiko acidecan guston, kiu fariĝas pli milda, se oni lasas la bieron maturiĝi en kverkaj bareloj dum du someroj. Lambiko estas farata nur vintre, ĉar la somera varmeco kaŭzas tro multe da acidiĝo.



Lambiko estas la baza biero por la produktado de geŭzaj kaj fruktaj bieroj. Aldono de freŝaj ĉerizoj (ĉirkaŭ 200g/litro!) aŭ framboj rezultigas fruktecan, pli dolĉan guston. Tradicia geŭza biero estas ĉiam produktata el 100 procentoj da Lambiko, dum „moderna” geŭzobiero devas enhavi nur parton de trijara Lambiko. La plej bona geŭza biero „de Boon” el Lembeek enhavas 85 procentojn da maljuna kaj 15 procentojn da juna Lambiko.



„moderna” geŭzobiero devas enhavi nur parton de trijara Lambiko. La plej bona geŭza biero „de Boon” el Lembeek enhavas 85 procentojn da maljuna kaj 15 procentojn da juna Lambiko.

Miksa fermentado:

Sudflandraj ruĝaj bierspecoj

Tiuj ĉi brunruĝaj bierspecoj estas la rezulto de unika procedo de miksitata fermentado – kombino de alta fermentado kaj bakteria flaŭro, kiuj transformas la organikajn acidojn kaj altajn alkoholojn al esteroj. Post la ĉefermentado de la plej populara Rodenbach [ródenbaĥ], la biero maturiĝas dum 18 monatoj en kverkaj ujoj, el kiuj kelkaj aĝas pli ol 150 jarojn. Poste miksitata kun juna biero, Rodenbach havas acid-dolĉan, kverkan kaj tre freŝigan guston kaj estas kvazaŭ la ruĝa vino inter la bieroj.



Pluraj el la bierfarejoj de tiu bierspeco estas senpage viziteblaj! Nepre informiĝu dum via vojaĝo en Belgio!

Lode VAN DE VELDE

Abonhelpa Fonduso.

En 2000 la legantoj de MONATO donacis 58 senpagajn abonojn al Esperanto-parolantoj en Albanio, Ĉado, Ĉinio, Irano, Kostariko, Kubo, Malio, Rumanio, Ruslando, Vjetnamio kaj en aliaj landoj. Sed restas ankoraŭ multe pli kiuj deziras legi revuon en Esperanto sed ne havas la financon kapablon por pagi ĝin. Vi helpu al ili ricevi MONATOn senpage donacante sumon al la „Abonhelpa Fonduso”.



Sendu kiun ajn sumon al FEL aŭ al via kutima peranto, kun la mencio „Abonhelpa Fonduso de MONATO”.

Se vi deziras, vi povas ankaŭ ekscii, kiu ricevis la abonon kiun vi donacis kaj eble ekkorespondi kun „via” leganto. Skribu tiucele al la eldonejo.

Nome de ĉiuj ricevantoj kaj ricevontoj koran dankon!

AŬSTRIO

Ventelektrejoj en ofensivo

„Nur ke la forta vento fine ĉesu!” – tiu ekkrio fojfoje estas aŭdata de la ĉefoj de la centraloj produktantaj elektron el la grava alternativa energio: tiu de la vento.

Tro da vento estas malbona por la ventelektrejoj.



Kvankam la helicoj aŭtomate ĉesas funkcii kiam la ventorapideco superas la valoron 85 km/h, „tamen antaŭ kaj post tiuj kulminoj estas observata pli alta konsumado de la elektro”, diris Winfried Dimmel [vinfrid dimel], direktoro de la Societo de Ventenergio en Aŭstrio.

„La uzo de la ventenergio forte disvolviĝos ĉi-jare”, diris Dimmel. La investoj por la jaro 2000 estas 30 milionoj da aŭstria ŝilingoj. Tiu monsumo estos impulso por la konstruado de 50 grandaj ventelektrejoj en Orienta Aŭstrio. Kaj krome, laŭ Dimmel, tiuj investoj kaŭzos pluajn investojn je totalo de 480 milionoj da ŝilingoj por ventelektrejoj.

Samtempe multaj federaciaj landoj altigis la konsumtarifojn de la elektro produktata laŭ naturamika maniero. Ekzemple, Malsupra Aŭstrio pagas po 0,9 ŝilingoj, kaj Vieno po 0,89 ŝilingoj por kilovathoro da elektra energio el ventelektrejoj. Sekve de tiuj plialtigitaj tarifoj kaj helpe de investoj eblas fondi ekonomiajn entreprenojn.

Do, nun en Aŭstrio estas 86 grandaj ventelektrejoj, kiuj liveras elektron al la landa elektreto. Ili jam disponigas elektron al 23 000 loĝejoj en la lando, kaj rezulte de tio oni ĉiujare evitas aerpoluan ellason de 18 200 tunoj da karbon-dioksido.

„Konsidere la grandskalajn planojn por kreskigi la produktadon de ventelektro oni nun serĉas interesatojn, kiuj volas partopreni en projekto pri konstruado de ventelektrejoj”, diris Dimmel.

Nun la plej granda produktanto de ventelektro en Aŭstrio estas la entrepreno Waldviertler WEB-Windenergie.

Ĝi havas en la norda kaj balta regionoj de Germanio 4, kaj en Aŭstrio 12 ventelektrejojn. Dek pliaj estas planataj, inter kiuj estas tiaj por projektoj en Hispanio.


Andreas Dingl, direktoro de WEB-Windenergie, komunikis, ke en Germanio la utiligo de ventenergio, simile al la telekomunikado, estas unu el la plej intense kreskantaj industribranĉoj. Tie dum la lastaj kvin jaroj estis estigitaj 10 000 laborlokoj. Komence de la nuna jaro en Germanio estis 8000 vent-instalaĵoj por produktado de elektro, el kiuj 1000 nur pasintjare ekfunkciis.

Ankaŭ la dua plej granda aŭstra produktanto de ventelektro DonauWind (Danubiovento) havas planojn por plikreskigo de la ventelektrejoj kapacitoj. Tiu entrepreno havas ventelektrejojn en Malsupra Aŭstrio ĉe Zistersdorf kaj Vieno. Samkiel WEB-Windenergie ankaŭ DonauWind proponas demokratian partoprenmodelon. Michael Galhaup, eksperto de DonauWind, deklaris, ke ĉiu investanto ricevos la rajton demokratie partopreni en la pridiskuto de ĉiuj esencaj decidoj de la entrepreno.

Evgeni GEORGIEV

Malsanaj arbaroj de Eŭropo

Tiom da damaĝitaj arboj* troviĝas en la komplete areo (en %)



* gradoj 2 ĝis 4 de la damaĝoskalo ĉe koniferoj kaj foliarboj – fonto: EU-komisiono / stato 1998

© Globus 5901

Ĉiu kvara arbo en Eŭropo estas malsana. Laŭ plej freŝa esploro 23 procentoj de ĉiuspecaj arboj havas mezgradajn ĝis gravajn damaĝojn. Plej multe malsanas kverkoj, fagoj kaj kelkaj pinospecoj. Plej multe trafitaj estas arbaroj en Bulgario, Pollando, Ĉeĥio kaj suda Germanio.

Formortanta lingvo de malplimulto en Ĉinio

La manĉuroj estas unu el la plej grandaj inter la multaj minoritataj etnoj de la popolrespubliko Ĉinio. Ĝia loĝantaro superas dek milionojn. Kiuj tamen povas paroli la manĉuran ne atingas centon, laŭ la MONATO-korespondanto Sabeo Fu, el Chengdu [ĉendu], urbo en, aŭ ĉe limo de, la regiono kie ili loĝas. La rapido de la forpereo de la lingvo samas kiel tiu de specioj. Probable la manĉura kiel parola lingvo malaperos en dek jaroj, se oni ne alprenos urĝajn rimedojn.

La ekzistanta manĉura estas rigardata de la fakuloj kiel rara primara materialo por esploro, vivanta fosilio, inda esti traktata kiel ŝtata trezoro. La specialistoj proponas

ke oni urĝe fosu kaj savu tiel la lingvon kiel la kulturon kaj morojn. Nia

korespondanto antaŭnelonge vizitis sian amikon, s-ron Zhao [ĝaŭ], manĉuron pli ol 70 jarojn aĝan, loĝantan en Chengdu. Li ne trovas ĉe s-ro Zhao manĉurajn trajtojn: li estas islamano laŭ siaj manĝaĵoj, de gento *ji* [ĝji] kaj tibetana laŭ siaj vestaĵoj. Nia raportisto konatiĝis kun sia najbaro jam antaŭ longe kaj ĵus eksciis lin esti manĉuro. Okaze de la ceremonio de ĉi ties naskiĝtago, li ektrovis lian manĉuran familian nomon. La maljunulo rakontis pri sia familio. Lia prapatro estis ano de la manĉura trupo garnizonanta en Chengdu, konsistanta el 3 000 oficiroj kaj soldatoj, kiuj alvenis de Jingzhou [ĝjinĝoŭ] de la provinco Hubei (ĥubej) en 1718. (La legantoj

ne kleraj pri la orientazia historio sciu ke tiam Ĉinio estis sub la tri- kaj duonjarcenta regado de la manĉuroj, nomata la imperio Qing [ĉjing].) Liaj antaŭuloj heredis la postenon en la trupo generacio post generacio ĝis la retiriĝo el la politika areno de la manĉuroj en 1911. Ĉar la manĉuroj vivis kune kun la ĉefgento Han [ĥan] de Ĉinio tiom longe, iom post iom ili preskaŭ identiĝis al la hanoj en vivstilo, moroj kaj precipe en parollingvo.

La maljuna manĉuro konfesas ke liaj samgentanoj estas asimilitaj. La MONATO-ĵurnalisto demandis, kio estas la perspektivo de la manĉura lingvo.





„Mi jam estas perfekta uzanto de la hana,” li diras. „Mi tute ne scipovas paroli aŭ skribi la manĉuran, eĉ ankaŭ mia patro aŭ avo. Ĝi fremdas al mi kiel fremdlingvo. Ŝajnas ke ĝi ne utilas al ni...”

Historia skizo

La ĉina civilizo estis konstante minacata de ĉirkaŭaj barbaroj, simile kiel estis la roma imperio fare de ĝermanoj, kaj mezepokaj okcident-eŭropaj reĝlandoj fare de la normanoj. La ĉefaj el tiaj invadantoj estis turkoj, mongoloj, manĉuroj, kaj tibetanoj, kaj la tri unuaj eĉ konkeris la ĉeflandon de la hanoj. La unuaj tiaj danĝeraj fremduloj estis la hunoj, kiuj, ne sukcesinte konkeri la Mezan Regnon pro la efikaj rezisto kaj repuŝo fare de la imperio Han, migris okcidenten ĉirkaŭ la dua jarcento antaŭ la komuna erao kaj minacis en la persono de Atilo la tutan kristanan mondon. Oni diras, ke ili estis turkoj aŭ miksaĵo de turkoj kaj mongoloj. Han estas la etimo de la gentnomo Han, kiu propre ne estis uzata de la ĉinoj mem.

Meze de la tria jarcento de la komuna erao, en la Ĉielan Imperion invadis nordaj barbaroj konsistantaj el diversaj etnoj. La dinastio de la hanoj transmigris en la sudon de la ĉina kontinento. Tio estis la unua fojo kiam starigis fremdgenta registaro sur la ĉeflando. Fine de la 5a jarcento, Ĉinio estis denove reunuigita sub la dua mondimperio, t.e. de alia mondo ol la okcidenta, post Han sub la nomo de Tang. En la 10a jarcento en norda Ĉinio establiĝis fremdula regno de manĉuroj, nomata Jin [ĝjin]. Dum la mongoloj estis nomadoj, la manĉuroj estis ĉasantoj el la nordorienta periferio de la ĉina civilizo, ĉiam havantaj aspiron al la moroj de la hanoj, kaj rapide asimiliĝis al la rafinita kulturo, same kiel iliaj posteuloj, pri kiuj temas nun. La ĉinoj mem persistis en la suda parto

de Ĉinio, kiel estis antaŭ duonjarmilo.

Ĉi tiu manĉura dinastio estis poste siavice jugita sub la mongoloj, kiel parto de ties mondimperio, kiu estis preskaŭ fariĝonta vere monda, venkinte en 1241 la aliancajn trupojn de la Sankta Imperio kaj de la poloj ĉe Liegnitz en Silezio antaŭ ol ili retiris armeojn je la morto de la Granda Ĥano en la hejmlando. La han-genta regno en la suda Ĉinio estis alorbita al la mongola imperio – tio estis la unua fojo kiam la tuta Ĉinio estis sub fremda regado.

Sur la ruino de la mongola ŝtatarato prosperis han-genta regno nomata Ming, la tria tia potenco post Han kaj Tang, sed meze de la 17a jarcento, la tuta Ĉinio falis, por la dua fojo, sub la agreso de barbaroj, tiufoje de la manĉuroj, kies imperio daŭris ĝis 1911. La lasta imperiestro de la manĉura dinastio sin lasis ludi rolon de marioneto enmane de la japanaj imperiistoj en la tiel nomata Manĉura ŝtato de post 1931. Tio estis la signalo al la dua mondmilito. Li estas protagonisto en la

filmo *La lasta imperiestro* de Bernardo Bertolucci [bertoluĉi]. La nunaj ĉinoj neniel uzas la geografian nomon Manĉurio – kiel forgesi? –, ĝi estas la nord-orienta regiono.

Lingva geneologio

La manĉura lingvo estas pli bone konata inter la okcidentanoj sub la nomo de tungusa, apartenanta al la altaja lingva familio, kune kun la lingvoj de la aliaj ĉefaj invadantoj en Ĉinion, la mongolaj kaj la turkaj, aŭ tjurkaj por distingi disde la lingvo de la nuna respubliko Turkio, kiu estas unu el la tjurkaj (vidu PIV). La hipotezo de ural-altaja familio ne estas universale agnoskata. Uralaj estas la finna kaj la hungara. Ne estas pruvita la klasigo de la korea kaj la japana al la altaja. Kontraste al tio, la ĉina kune kun la tibeta estas el la sino- aŭ ĉino-tibeta familio. La asigno de la vjetnama al ĉi tiu ne estas pruvita.

Sabeo FU/YAMASAKI Seikō

LATINO

Utilo aŭ malutilo?

Ekzistas multe da bonaj kialoj, lerni mortintan lingvon kiel la latina: enprofundiĝo en pasintan kulturon, lingvaj studoj, scivolo pri historio kaj aliaj. Sed, laŭ mia impresoj, la latina ne helpas por la kompreno de fakesprimoj, kiuj troviĝas en la modernaj eŭropaj lingvoj. Por tion testi, mi petis 35 gelernantojn, kiuj estis lernintaj dum kvar jaroj la latinan, trovi la latinajn vortojn por 15 novlatinaj esprimoj kaj traduki tiujn latinajn vortojn en la germanan. Ekzemplo: *Zentrum* (novlatina vorto en la germana) venas de la latina *centrum* kaj signifas germane *Mittelpunkt* (Esp. „centro”). Jen la 15 vortoj (en krampoj en Esperanto): *Planet* (planedo), *Pendel* (pendolo), *Modell* (modelo), *Punkt* (punkto), *Sekunde* (sekundo), *Skala* (skalo), *Gramm* (gramo), *reflektieren* (reflekti), *Gletscher* (glaĉero), *Dimension* (dimensio), *Komponente* (komponento), *Sport* (sporto), *Express* (ekspreso), *Äquator* (ekvatoro) kaj *giga-* (prefikso, kiu signifas miliardon). Eblis 35oble 15 = 525 respondoj. Venis 47 % de la respondoj. Entute nur 12 % de la respondoj estis ĝustaj, sed 27 % tute falsaj! Iuj pensis, ke *dimensio* venas de *menso*, la plej konata romia ekvatoro de akvo, *planedo* de *plena*! Kelkaj inventis konstruaĵo en Aŭstrio, vortojn, kiuj ne ekzistas en la klasika latina: *30 km oriente de planetarius* (konjektita signifo: „pilko!”), *pendulum* (Vieno, sur unuŝilinga („svinganta ŝnurego!”), *sportum* („plifortigo”) kaj *aŭstria poŝtmarko, grammum* („pesilo!”). *Sekunde* venas de *sekvi*, tion eldonita en 1947. la duono sciis. Tamen en tiu okazo la latina ne helpas, se oni ne scias la evoluon de tiu vorto: Unue oni mezuris la tempon je horoj, poste oni „malgrandigis” (latine *minuere*) la horon al *minuto*, kaj poste la minuton al la „sekva” unuo, la sekundo.

Do jen mia konkludo: Se oni volas kompreni novlatinajn vortojn, la scivolo de la latina pli damaĝas ol helpas!

Walter KLAG



La Pagana Pordego (germane Heidentor): la plej konata romia konstruaĵo en Aŭstrio, 30 km oriente de Vieno, sur unuŝilinga aŭstria poŝtmarko, eldonita en 1947.

de Julian Modest

La peko de Ros

Estis la mezo de septembro. Friska vento lulis la branĉojn de la arboj en la parko. Ros sidis sur benko kaj rigardis al la infanludejo, kie ludis ŝia kvarjaraĝa filineto Irena. Akra maltrankvilo turmentis Roson. Ĝi similis al birdo, kiu subite enflugis en ĉambron, freneze batas sin kontraŭ la murojn kaj ne povas trafi la malfermitan fenestron por elflugi denove libere eksteren. Ĉivespere la najbaroj, familio Mason, invitis Roson kaj ŝian edzon al vespermanĝo. Morgaŭ Emil, la filo de gesinjoroj Mason, iros soldatservi.

Ros kaj ŝia edzo nepre devis akcepti la inviton. Ili ne povis rifuzi. Plurjara amikeco ligis la du najbarajn familiojn, sed la koro de Ros timtremis, kaj ŝi ne sciis, kiel ŝi eltenos la vespermanĝon, dum kiu estos enuaj ŝercoj, malspritaj anekdotoj, superflua babilo. Sinjoro Mason kaj Gabriel, la edzo de Ros, iom ebriiĝos kaj Emil certe dum la tuta vespermanĝo profunde kaj silente fiksrigardos ŝin kaj tion nepre rimarkos ĉiuj ĉe la tablo. Teruro ŝin obsedis, ĉar Ros sciis, ke la alkoholaĵo estas malbona konsilanto kaj neniu povas antaŭvidi kiel agos homo sub la influo de la alkoholaĵo. Emil estis bona kaj serioza knabo, sed morgaŭ li forveturos malproksimen kaj dum unu jaro li estos for de la gepatroj, de parencoj, de amikoj. Povus okazi, ke ĉivespere li faros ion nepripensitan, kio estos fatala por Ros, por Emil mem kaj liaj gepatroj.

Nun Ros profunde bedaŭris, sed jam estis tre malfrue kaj nenion oni povis ŝanĝi. La vivo ne estas filmo. Ne eblas returni la bendon aŭ reĝisori denove iun epizodon, kiu estis fuŝe ludita aŭ kiu povus konfuzi la sekvajn epizodojn. Iuj diris, ke ni mem reĝisoras nian vivon, sed Ros ne kredis tion. Ŝi estis konvinkita, ke la homo agas laŭ ies ekstera volo kaj multfoje oni ne konscias kial agi iel aŭ aliel. Kio igas nin fari ian aŭ alian paŝon en la vivo, malgraŭ ke ni ĉiam bone pripensas niajn agojn? Aŭ eble Ros mem estis malbona reĝisoro de sia vivo.

Irena kuris, senzorge ludis kun la aliaj infanoj. Ros rigardis, sed kvazaŭ ne vidus ŝin. Irena estis la plej kara estaĵo en la vivo de Ros. Ros ne deziris amarigi ŝian infanecon, sed ŝi ne

povis eĉ konjekti, kio surprizos ŝin ĉivespere dum la vespermanĝo ĉe familio Mason. Jes, Ros bedaŭris, kvankam ŝi bone sciis, ke estas tre malfrue.

Antaŭ unu jaro jam de la unua momento ŝi estis maltrankvila, sed io pli forta kaj pli potenca subpremis ŝian maltrankvilon. Nun la timo en ŝi vekigis kaj kiel raba falko terurigis ŝin. Ros ne deziris detrui sian familian vivon, ne deziris malbonigi la rilatojn kun la familio Mason, nek ĉagrenigi Emilon. Nun ŝi vidas sin sur rando de abismo, al kies fundo ŝi baldaŭ ekflugos.

Ĉio komenciĝis pasintjare en iu trankvila septembra tago, kiun Ros neniam forgesos. La lernoĵaro ĵus estis komencita kaj la patrino de Emil, Natalia, petis Roson veki Emilon, por ke li ne malfruiĝu al la lernejo. Ros bone memoris, ke tiam ŝi kuiris ion en la kuirejo, kiam ĉe la pordo sonorigis Natalia. Ros afable invitis ŝin en la loĝejon. Ili estis tre bonaj najbarinoj kaj amikinoj. Ofte ili renkontiĝis, trinkis kafon kaj babilis. Natalia estis flegistino en la urba malsanulejo. Ros ne laboris kaj zorgis pri sia filino. Ankau la edzoj de Natalia kaj Ros estis bonaj amikoj kaj plurfoje helpis unu al alia. La edzo de Natalia estis inĝeniero kaj de Ros - taksiaŝoforo.

„Ros, pardonu min”, petis ŝin Natalia. „Morgaŭ Emil devos esti pli frue en la lernejo. Mi iros al la laborejo antaŭ li. Petro oficvojaĝas kaj revenos malfrue vespere. Ĉu vi povus veki Emilon? Mi donos al vi la ŝlosilon de nia loĝejo. Emil jam estas en la lasta klaso de la gimnazio, sed li ankoraŭ ne povas vekigi sola matene. Kiam li dormas, nek vekhorloĝon, nek sonorilon li aŭdas.”


„Senprobleme. Tio estas tre facila. Mi vekos lin, eĉ kafon mi kuiras por li,” konsentis Ros ridete.

„Mi kore dankas, kara. Ja, mi ege timis, ke li malfruos morgaŭ matene.”

La sekvan tagon Ros vekigis frumatene. Gabriel, la edzo, ekiris al la laborejo. Ros kuiris kafon kaj iris en la loĝejon de la najbaroj Mason. Trankvile ŝi malfermis la pordon de la ĉambro kaj lasis la pleton kun la kafo sur la skribotablo. Poste ŝi atente proksimiĝis al la lito de Emil. La knabo dormis profunde kaj trankvile. Eble la vekhorloĝo delonge jam so-

noris, sed Emil tute ĝin ne aŭdis. Ros klinis sin super Emil kaj ekis tuŝi lin. Subite ŝajnis al ŝi, ke nun unuan fojon ŝi vidis lin. Emil havis nigran buklan hararon, altan frunton kaj delikatajn brovojn, similajn al du hirundflugiloj, kiuj tuj ekmoviĝos kaj ekflugos. Lia nazo estis rekta, iomete akra kaj liaj malfermitaj lipoj tre sentemaj. Emil dormis nuda ĝis la lumbo. De lia tuta korpo radiis freŝeco, energio, forto. Ĝis nun Ros eĉ ne supozis, ke Emil ne plu estas knabo, sed jam juna kaj matura viro, sana, forta kaj belega.

Ŝia mano nevole etendiĝis al la frunto de la dormanta junulo kaj ŝi tenere lin karesis. Emil tamen ne ek-sentis la mantuŝon kaj ne vekigis. Ros denove lin karesis, sed vane. Ĉiu ŝia tuŝo kvazaŭ varmigis ŝin. Ie profunde en ŝi ekfontis impeta kaj freneza torento, kiu ŝin trenis, tondris en ŝiaj oreloj kaj nebuligis ŝian rigardon. La bela trankvila vizaĝo de Emil logis ŝin kaj Ros ne povis deŝiri rigardon de li. Ŝi deziris tuj forkuri, sed ja ŝi promesis al Natalia veki lin. Emil dolĉe kaj beate dormis. Tiam tute senkonscie Ros klinis sin kaj tenere kisis lian frunton. Emil lante malfermis okulojn kaj ekridetis. Ros neniam vidis tian mirindan sunrideton. Emil vere estis la plej ĉarma juna viro, kiun iam ŝi renkontis. Nun li mire ŝin rigardis kaj eble ne komprenis ĉu li vekigis aŭ ankoraŭ songas. En lia rideto brilis kar-eco kaj sincero. Emil iom leviĝis de



la lito, etendis brakon kaj karesis harojn de Ros, kiu ankoraŭ estis klinita super li. Ros ekstremis, kvazaŭ tensio pasus tra ŝia tuta korpo. Ŝi instinkte provis deflankiĝi, sed ne sukcesis. Ŝiaj piedoj pezis kiel ŝtonoj. Emil eksentis, ke lia kareso plezurigis ŝin kaj lante li brakumis ŝin. Iliaj lipoj trovis unu la alian. Soifa longa kiso tremigis iliajn korpojn. Ros apenaŭ ne svenis. Antaŭ ŝiaj fermitaj okuloj estis nur la forta kaj muskola korpo de Emil. Ŝi image vidis liajn olivverdajn okulojn, kiuj kvazaŭ narkotus ŝin. Liaj sentemaj fingroj karesis ŝiajn harojn, lante glitis malsupren, karesis ŝiajn ŝultrojn, ŝian glatan dorson, koksojn, denove revenis al ŝia vizaĝo, al ŝiaj mamoj, kiuj iĝis pli kaj pli malmolaj kiel du maturaj pomoj, kaj poste al ŝia ventro, kiu pulsas kun la ritmo de ŝia koro. Infera fajro ŝin bruligis kaj Ros sentis, ke se tiu ĉi ludo daŭros ankoraŭ sekundojn, ŝi fandiĝos kiel neĝopilko en la varmaj manoj de Emil.

„Mi amas vin”, flustris Emil. „Mi ĉiam amis vin, sed ĝis nun mi ne kuraĝis eĉ alrigardi vin.”

Ros ne aŭdis liajn vortojn. Liaj fingroj, polmoj, lipoj frenezigis ŝin. Ĉio en ŝi tremis kaj profunde neimagebla dolĉeco ŝin obsedis. Nun ŝi sentis sin en mirinda mondangulo, kaj la plezuro, kiun ŝi travivis, estis la plej bela kaj emocia en ŝia tuta vivo. Lante, kiel blanka mevflugilo, ŝia robo falis sur la plankon. Kvazaŭ sonĝe ŝi liberiĝis de mamzono kaj nuda ŝi kuŝis en la

varman liton. Obsedis ŝin jubilo, ĝojo kaj ebrio, kvazaŭ du fortaj viraj brakoj tenere levus alten ŝin. Ros leĝere naĝis en la aero, simile al eta blanka plumo. Ŝi flugis supren, supren kaj de tie mire ŝi rigardis kio okazis kun ŝi malsupre, sur la lito.

Ros ne povis eĉ imagi kiel ĝis nun ŝi vivis. Kiel ŝi toleris la banalajn ŝercojn de sia edzo? Kiel ĉiuvespere ŝi renkontis lin, preparis la vespermanĝon, verŝis brandon, faris salaton kaj poste laŭ la devigo kaj rutino ŝi kuŝis kun la edzo en la grincanta familia lito.

La ardantaj lipoj de Emil tuŝis ŝiajn brovojn, lipojn, orelojn. Tenere li flustris ion ege belan kaj mirindan. Lia voĉo sonis kiel melodio, kiel friska roĵo, kiu ne ĉesas lirli en printempa frumateno. Ros neniam ĝis nun supozis, ke en tiu ĉi junulo estas tiom da tenero, energio kaj soifo. Emil estis nesatigebla. Li similis al homo, kiu dum tagoj vagis en dezerto kaj nun, kiam trovis akvon en friska oazo, li ne povas estingi sian soifon. Ju pli li trinkis, des pli forta kaj pli potenca li fariĝis. Ros bone komprenis, ŝi estas la fonto de la energio, kiu lin obsedis. Kaj tamen proksimiĝis la momento de la dolĉa laca fino. Iliaj korpoj falis ĝojaj kaj senmovaj kiel du persikoj maturaj, dolĉaromaj.

Kelkajn minutojn ili kuŝis feliĉaj kaj ebriaj de la dia nektaro. Kiam ili stariĝis, la kafo jam delonge estis malvarmiĝinta. Hodiaŭ Emil tro malfruis por la lernejo, sed Ros ne pensis pri tio.

Ilia mirinda travivaĵo ripetiĝis. Ros jam senpacience atendis la matenojn, kiam ŝi devis vekti Emilon. Li vere kapablis frenezigi ŝin. Nur lia rigardo sufiĉis kaj Ros jam dronis en la profunda beata rivero de ebriĝo kaj ĝuo. Ŝi sciis, ke tio, kion ili kaŝe faras, estas tre danĝera, sed Ros ne havis forton kontraŭstari. Ŝi sciis, ke ŝi kulpas. Ros estis dudektrijara kaj Emil nur deksepjara. Ja ŝi komencis la danĝeran ludon, sed eĉ por momento ŝi ne bedaŭris. Nun, kun Emil, ŝi travivis ion, kio neniam okazis kaj verŝajne ne plu okazos en ŝia vivo.

Ŝi edziniĝis al Gabriel relative juna kaj eble iom hazarde. Gabriel estis la unua viro en ŝia vivo kaj neniam ŝi intencis malfideli al li, tamen, kiam aperis Emil, ŝanĝiĝis ĉio. Ros ne meditis, kio okazos. Por ŝi pli gravis, ke Emil ekzistas.

Ofte, kiam Emil revenis de la lernejo, li eniris la loĝejon de Ros. En la fruaj posttagmezaj horoj, Gabriel kaj la gepatroj de Emil ankoraŭ ne revenis de la laborejoj. Irena, la filineto, dormis trankvile en la alia ĉambro, kaj Emil kaj Ros sidis en la kuirejo kaj longe konversaciis. Emil konfesis

siajn planojn kaj revojn. Post la fino de la gimnazio li deziris studi. Li bedaŭris, ke pli frue li ne renkontis Roson. Ŝi nur ridetis al liaj fantaziadoj kaj ripetis:

„Kiel belege vi parolas. Se mi havus tempon, mi aŭskultus vin de mateno ĝis vespero.”

Ŝia rido kolerigis Emilon. Li deziris, ke ŝi kredu al li, kaj insistis, ke ĉio, kion li parolas, ege gravas, kaj malgraŭ ke li estas deksepjara, li rilatas al la vivo tre serioze kaj respondece.

Ilia ligo tamen iĝis tre komplika. Emil malbonigis siajn notojn en la lernejo. Li finis gimnazion, sed ne sukcesis ĉe la ekzamenoj en la universitato kaj ne iĝis studento, malgraŭ ke li ege deziris studi arkitekturon. Aŭtune li devis iĝi soldato. La penso, ke li eniros la kazernon kaj estos malproksime de Ros, teruris lin. Ĉiam, kiam li renkontis Roson, li ripetis, ke sen ŝi li ne povus vivi. Ros ridetis kaj provis klarigi, ke post la soldatservo Emil nepre estos studento kaj forgesos ŝin, sed Emil insistis kaj kelkajn tagojn antaŭ la ekiro al la kazerno li diris al ŝi:

„Mi ne plu kaŝos nian ligon! Al miaj gepatroj kaj al via edzo mi diros, ke mi amas vin kaj mi edziĝos al vi.”

Tiuj ĉi vortoj stuporigis Roson. Ŝi ne eltenis kaj komencis krii:

„Vi estas freneza. Vi ne scias kion vi parolas. Ĉiam vi diris, ke vi ne estas bubo, kaj nun vi agas kiel stulta bubo.”

Ŝiaj vortoj tamen ambiciigis lin, kaj firme li deklaris:

„Mi ne estas freneza, sed kuraĝa. Mi ne deziras plu kaŝi min. Ĉiuj devas ekscii pri nia amo. La plej gravas, ke mi amas vin kaj vi min.”

Ros provis diversmaniere klarigi al li, ke li eraras, sed vane. Li estis obstina kiel infano, kiu insistas realigi sian deziron. Tio jam komencis maltrankviligi kaj teruri ŝin.

„Bone”, ŝi foje diris. „Faru kion vi deziras, sed vi bedaŭros. Se vi malkaŝos nian sekreton, vi perdos min por ĉiam. Mi forgesos vin. Se al iu vi diros ion, mi neos ĉion. Oni opinios vin freneza. Al vi neniu kredos. Oni kredos al mi. Mi havas familion. Neniam mi donis kialon por suspekto. Sed sciu, inter mi kaj vi tuj finiĝos ĉio!”

„Bone! Ni vidos!” minacis ŝin Emil. „Mi ne ŝercas!”

Nun Ros sidis en la parko kaj sencele gapis antaŭ si. Ĉu ĉivespere eksplodos la bombo, kiun ŝi mem ŝarĝis? Profunde en ŝia brusto ia ondo ĝue ŝin varmigis. Ja, estis iu viro, kiu pretas por ŝi fari la plej grandan kaj teruran frenezajon. Tamen ĉu Emil vere estos tiel kuraĝa? ■

KOSOVO

Vojaĝimpresoj, somero 2000

De antaŭ unu jaro, Kosovo estas senvize malfermita por ĉiuj albanoj. Tion ebligis la heroeca milito de la tieaj albanoj mem kaj la energia interveno de la internacia komunumo, ĉefe de Usono. Nun la vivo tie fluas libere. Sub la internacia administrado estiĝas la procezo de ekonomia kaj politika-socia rekonstruado, stariĝas la fundamentoj por la sekura estonto de la tiea frata popolo nia.

Estis mia dua vojaĝo tien, ĉar en novembro 1999 mi vizitis Kosovon kun miaj gestudentoj de la Teknologia Mezlernejo. Ĉifoje, mi veturis tien private kun mia edzino. Ambaŭ ni devenas de tiu lando. Mi naskiĝis en vilaĝo de Lipjan, dum mia edzino devenas de gepatroj el Gjakova [ĝakova]. Dum pli ol duona jarcento, ambaŭ reĝimoj de niaj totalismaj statoj senigis nin je la rajto viziti nian patrolandon. Tial ni sentis nin feliĉaj kaj iel senpaciencaj.

Historia kaj muzea Prizren

Verŝajne ne ekzistas alia urbo en Kosovo kiel Prizren, pro ties aparta arkitektura komplekso, kiu similas fojfoje al albana Berat, pro mallarĝaj stratoj plenaj je butikoj kaj homoj, pro pratempaj muzeaj objektoj, kaj – kial ne? – pro sia etna plureco. Multaj kvartaloj kaj stratoj restis kiel antaŭe kaj posedas ankoraŭ la iaman belecon kaj fascinecon por la vizitantoj, per siaj karakterizaj domoj, pavimitaj kaj puraj stratoj, multnombraj fontanoj, metiejoj kaj brua, abunda bazaro. Estas ankaŭ novaj kvartaloj kun modernaj domoj, centre kaj rande de ĝi, kiuj tamen ne sukcesis detrui la iaman imagon de la urbo.

La promenejo ĉe Bistrice svarmas pro gejunuloj ĉiun vesperon, ĝis la malfruaj horoj de la nokto. En la Domo de



Hadumo-moskeo en kvartalo Cabrat de Gjakova, kiu estis detruiita samkiel 250 objektoj (metiejoj, butikoj, vendejoj) en la sama kvartalo.

Kulturo *Xhemajli Berisha* [dĵemajli beriŝa] eniras kaj eliras senĉese gelernantoj kaj aĝuloj, kiuj frekventas la bibliotekon. En la oficejoj de UNMIK, OSKE aŭ KFOR oni povas renkonti oficistojn de ĉiuj rasoj, samkiel tio okazas nuntempe en la tuta Kosovo.

La urbo enhavas, krom la albanan plimulton, ankaŭ civitanojn de aliaj etnoj, sed la serboj preferas vivi aparte,

KFOR: la pacigaj UN-milittrupoj en Kosovo

NATO: Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo

OSKE: Organizaĵo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo

UÇK [UĈK]: albana mallongigo de la Armeo por Liberigo de Kosovo

UN: Unuiĝintaj Nacioj

UNMIK: nomo de la UN-administracio de Kosovo

ĉefe en la kvartalo malsupre de la kastelo, trans la ponto sur Bistrice. Ilin gardas 24 horojn tage taĉmentoj de KFOR, samkiel oni gardas ankaŭ apartigitan ortodoksan preĝejon ene de la urbo.

Kiom longe daŭros tiel? Certe ne senlime, ĉar tio estas malnormala. Albanoj estis ĉiam tolerema popolo rilate la aliajn. La serboj, kiuj faris krimojn, devas respondi antaŭ la juĝejoj, dum la

aliaj rajtas libere kunvivi kun albanoj kaj aliaj etnaj malplimulto. Mi havas impreson, ke tia *status quo*, establita de internaciaj institucioj, kreas tre negativan imagon pri albanoj antaŭ la okuloj de la cetera mondo. Unuflanke albanoj kaj neserboj moviĝas libere sur la stratoj, dum manpleno da serbaj domoj restas sub gardado de tankoj, kamuflitaj aŭtoj kaj soldatoj armitaj ĝisdente, kiuj akompanas serbojn dum ilia promenado tra urbe post komenciĝo de la polica horo (la unua post noktomezo). Oni devas nepre trovi solvon.

Fianĉfesto en Gjakova


Ni estis invititaj al fianĉfesto en Gjakova. Kvankam la dommastroj, la familio de Avni Ĉarkaxhiu [ĉarkadĵiu], spertis multajn malfeliĉaĵojn dum milito kaj mankis al ili ankoraŭ tri membroj perditaj aŭ enprizonigitaj en Serbio, oni jam anoncis la fianĉfestotagon. Tiamaniere oni pensis forigi iel la angoron, sed ankaŭ noti la kontinuecon de la normala vivo.

Luan Ĉarkaxhiu, la fianĉo, ĉirkaŭ 27-jara, ne forlasis la urbon dum la tuta militdaŭro. Kun siaj gepatroj kaj gekuzoj li vagadis de unu domo al la alia, trans la kortomuroj kaj la apuda rivereto, helpante al la malfortuloj kaj membroj de UÇK. La filo de lia onklo, Flamur, kuracisto, estis tre utila kaj necesa, samkiel dekoj da liaj kolegoj en la tuta Kosovo.

Kun la patro de Luan kaj aliaj civitanoj, Flamur estis kaptita de serbaj militistoj kaj metita kontraŭ la muron stratrando por esti pafmortigita kiel ribelulo. Sed lastmomente feliĉa hazardo ilin savis: serba oficiro malbonfama, kiun Flamur antaŭe ege helpis dum lia restado en hospitalo, ekvidante Flamur en la amaso de pafmortigotoj, ordonis ĉesigi la ekzekuton. Mirinde, ankaŭ krimuloj scias pardonon!

Oni rakontis al mi poste alian okazintaĵon, kun juna serba soldato kiu akompanis la homamasojn de albanoj survoje al la ŝtatlimo kun Albanio. Tiu junulo helpis al albana patrino kunportante sur siaj ŝultroj unu el ŝiaj ĝemelaj beboj. Nature, la popoloj jam kutimiĝintaj kunvivi dum jarcentoj, ekmilitis unu kontraŭ la alia pro insido kaj trompado fare de siaj fipolitikistoj!

En Gjakova okazis multaj murdoj, estis tute bruligita duono de la urbo, estis forkaptitaj centoj da viroj kaj virinoj al Serbio, pri kies sorto oni ankoraŭ nenion scias. Tiel, oni enprizonigis en Belgrado la filon de Fahredin Meçe [meĉe], bofilo de Avni. Dritan Meçe estis studento en fakultato pri medicino (farmakologio) en Belgrado. Je la 27a de aprilo 1999 en la



Domo en Gjakova.

BARDHYL SELIM

studentan domon eniris perforte taĉmento da serbaj policistoj kaj arestis lin kaj aliajn studentojn. Dum 8 monatoj oni restigis ilin en polica demando, devigante ilin per turmentado konfesi sian „krimon”, t.e. „enplektiĝon en terorismaj agoj kontraŭ la ŝtato”. Kvankam antaŭ la juĝejo ili neis la akuzon, oni kondamnis ilin je 7 ĝis 12 jaroj da prizono. Fahredin, elspezante multe, sukcesis viziti sian filon en la centra prizono de Belgrado, sed li ne scias kio okazos poste al lia filo kaj al miloj da aliaj enprizonigoj en Serbio.

La fianĉfesto okazis laŭ la gjakovaj tradicioj. Estis en ĝi multaj invititoj, oni plenumis ĉiujn tiuokazajn ritojn, la homoj jam forgesis provizore la streĉon de tiuj ĉi malfacilaj tempoj. La nova paro, studentoj ĵus diplomitaj je juro kaj ekonomiko, deziris al ili pacon, prosperon kaj estontecon. Albanoj kapablis ĉiam fronti ĉiun plagon kiu trafis al ilia pordo, pacience, optimisme kaj malvarmsange.

Tion mi konstatis ankaŭ iun dimanĉan matenon en Ĉabrat [ĉabrat]. Inter 250 forbruligitaj butikoj, metiejoj kaj aliaj domoj, inkluzive la faman malnovan moskeon de Hadumi, mi vidis du masonistojn kaj civitanon kiuj estis rekonstruantaj unu el la ruinigitaj butikoj. La butikoj estis jam tegmentita kaj en iliaj okuloj sentiĝis decidemo kaj certeco pri la estonto. La butikomastro rakontis pri la tuta kvartalo, pri la advokato murdita kaj aliaj dekoj da mortigitoj dum ilia fuĝado, pri kelkaj domoj kiuj eskapis la detruadon, pri usona fonduso entrepreninta la restarigon de la fama bazaro de Gjakova, Ĉarshia [ĉarŝia] e Madhe, unu el la plej grandaj en albanaj teritorioj.

Dum interbabilado kun diversaj civitanoj, oni ekscias de ĉiu pri nova

historiaĵo. Tiel, oni rakontis al mi pri iu albana poŝtovicisto, de kiu serba kolego, enveninta en lian hejmon tute vizaĝmaskita, postulis 50 € germanajn markojn. Ricevinte la monon, la serbo foriris, sed la albano lin ekkonis kaj vokis: „bonan tagon kamarado...!” Tio estis fatala por la albano, ĉar lia serba kolego, pro timo de senmaskiĝo, returniĝis kaj mortpafis lin.

Alia albano, eksbatalanto en la vicoj de partizana armeo dum la dua mondmilito, poste alta oficulo en la eksa jugoslava ŝtato, estis devigita transpasi kun familio la landlimon, ĉar la serbaj militistoj ne distingis lin de la aliaj, eĉ ne pro fakto ke li estis eksbatalanto partizana. Li diris al mi, ŝokite, ke oni agis tiamaniere, ĉar „pli bona estas viva Leko, ol la tombo de Leko.” (Leko estas mallongigo de Aleksandro la Granda).

Sihana, junulino 22-jara, diplomitiĝanta pri teorio de muziko, ankoraŭ estis ege streĉita pro la pasinta milito. La lastan tagon de la milito, ŝi biciklis al la centro de la urbo por atendi la trupojn de NATO, ĉar tiel informis ŝin iu maljunulo. Anstataŭe, ŝi renkontis tie la serbajn militistojn, pretajn por forveturi el la urbo. Unu serbo volis mortpafi ŝin, sed la kuglo devojiĝis pro interveno de alia soldato, tiel bonŝance nur trafanta la bicikloradon. La milito forrabis la gajecon kaj rideton, aparte de junuloj. Nun tio estis redonata malfacile, eĉ unu jaron poste.


En Priština

Survoje al Priština [priština], oni sentas plezuron ekvidante miraklan pejzaĝon: verdajn kampojn kaj ebenaĵojn, arbarigitajn kaj malkrutajn montojn, multe da birdoj kaj kiajn ajn ve-



Kvartalo en la historia kaj muzea urbo Prizren.

BARDHYL SELIMI



Monumento omaĝe al la Batalo de Kosovo-Kampo

turilojn transportantajn homojn kaj konstrumaterialojn. Ie, apud ponto gardata de rusaj trupoj, okulfrapis min stakoj da rubaĵoj sur ambaŭ flankoj de la aŭtovojo, laŭlonge je centoj da metroj. Demandite pri la kialo, la busŝoforo respondis naive, ke oni faras tion intence ĉar rusoj militservas ĉi tie. Vera absurdaĵo! Tio estas nia tero, la tero de albanoj, do ĝi estas konservenda de ni mem tre pura!

Priština aperas post iom pli ol 90 minutoj da veturado. Ĝi ne estas tiom proksime, sed la vojoj estas bonaj kaj la veturiloj iras ĉi tien je rapideco ne malpli ol 80 km hore. La busstacidomo, samkiel en Prizren kaj Gjakova, estas bonorda kaj komforta. (Mi bedaŭras ke en Albanio oni ne trovas tiajn.) La urbo stariĝas tre moderna sur kelkaj belaj montetoj. Oni apenaŭ distingas en ĝi la malnovajn kvartalojn. Ankaŭ tiaj objektoj kiel la tri moskeoj (la malgranda, la mezgranda, kaj la granda) estas nun parte ĉirkaŭataj de novaj domoj. Oni trovas pluretaĝajn domkompleksojn en Dardanija, Ulpiana, en la Centro kaj aliloke, dum sur terasoj de Dragodan, Bregu i Diellit (La Bordo de Suno), Velanija, Taxhligje [taĝlidĵe] vidiĝas belaj vilaoj du- aŭ tri-etaĝaj.

Mirinde, ankaŭ ĉi tie mi rimarkis la fenomenon aperintan en Albanio: senpermesajn kaj senkriteriajn konstruaĵojn. Oni starigis etaĝaldonojn kaj kioskojn aŭ adaptis ejojn por vendejoj, kafejoj aŭ restoracioj ktp, ne nur en urbo, sed ankaŭ en ĉirkaŭaĵoj, ĉefe en la teroj posedataj de la ŝtato. Iu tagĵurnalo aperigis, en tiu periodo, la nomliston de homoj kiuj agis kontraŭleĝe, kiel antaŭaverton pri ilia maldigna aŭdaco kaj malrespondeco. Sen-

dube, la nova civila ŝtatpotenco intervenos por gardi la ĉarmecon kaj belecon de la urbo.

Jam finiĝis la registrado de loĝantaro pli ol 16-jara por la balotoj de la 28a de oktobro 2000. La homoj diskutis al kiu politika forto ili donu sian voĉon. En multaj hejmoj, ankaŭ en vilaĝoj, mi vidis surmure la portreton de Ibrahim Rugova, dum iu studento pri albana lingvo, kies fratino serboj mortigis ene de la hejmo, diris senhezite ke li eĉ ne balotos. Alia lia kolego opiniis ke nur la partio de Thaĉi [thaĉi] certigus la sendependecon de Kosovo. Kiel ajn, albanoj tie mem decidis pri sia estonto. Multaj el ili kritikis akre ne

Sinjoro Demaçi diris, ke la afero de ostaĝoj estas ja granda malfeliĉaĵo por ĉiuj ni, sed la internacia faktoro nun estas malsufiĉe potenca por devigi Serbion liberigi ilin. Estas ja intereso de apartaj ŝtatoj, kiuj havis ekonomiajn interkonsentojn kun la eksa Jugoslavio, kiel Francio, Grekio, Italio. Same oni devas harmoniigi la interesojn de 15 landoj de EU, de 19 landoj de NATO, de 49 landoj de OSKE, de 189 landoj de UN, ktp. Kosovo estas ja la nodo, kie interplektiĝas ĉiuj tiuj interesoj. Al la serboj konvenas, pro du kialoj, la ostaĝoj: unue, por demonstri sian suverenecon sur Kosovo, kio, iamaniere, estas konfirmata ankaŭ de rezolucio de UN post

'Albanoj en Kosovo sin distingis ĉiam per sia granda volo je laboro. La fertila tero de Kosovo pliriĉiĝis per senlaca laboro de ĝiaj agrikulturistoj'

nur la okazojn de perforta proprietiĝo de alies posedaĵoj, ankaŭ de serboj aŭ ciganoj, sed ankaŭ la politikajn murdojn, kiuj fojfoje okazis fare de ekstremismaj armitaj grupetoj. Ĉiuj tiuj grave damaĝis la albanan aferon en la internacia areno, dum la serbaj propagando kaj lobiado estis ankoraŭ fortaj.

Renkontiĝo kun Adem Demaçi

En Priština mi ĝuis varman renkontiĝon kun Adem Demaçi [demaĉi], laŭreato de Saĥarov-premio, en lia hejmo. Mi demandis lin pri du problemoj: la albanaj politikaj ostaĝoj en Serbio kaj la Universitato de Tetovo en Makedonio.

finiĝo de milito; due, pro materiaj profitoj, ĉar por ĉiu ostaĝo liberigita Serbio ricevas dekmilojn da germanaj markoj rekompence de albanaj familioj. Tiuj lastaj forvendas sian tutan riĉaĵon, nur por liberigi siajn hejmulojn.

Rilate la universitaton de Tetovo, li ne apogas ŝtatan universitaton enkadre de Makedonio, ĉar tiuokaze oni devas sekvi la planprogramojn makedonajn, kaj la kvalito ne estus pli alta. Li aldonis, ke li favoris kaj favoras privatan universitaton, financotan ekde nun je 5-6 milionoj da usonaj dolaroj, per kiuj oni povus aĉeti ekipaĵojn je progresinta teknologio kaj varbi kvalifikitajn profesorojn el Usono kaj



BARDHYL SELIMI

1389.

aliaj landoj. La fremdaj helpaĵoj daŭros multajn jarojn kaj celas la pretigon de novaj generacioj de albanaj kadroj, laŭ modelo kaj nivelo okcidentaj. Li tial konsideras aventureca kaj malnova la nunan ekziston de universitato en Tetovo, kies rektoro, Fadil Sulejmani, mezgrada kadro pri albana lingvo, kaj ties anstataŭulo, je dubinda pasinteco, baraktas por sia ekzistado kiel

gvidantoj kaj ne pri la estonto de albanoj tie.

Albanoj ne kapablas subteni per siaj elspezoj eĉ la mezlernejojn, ĉar iliaj pojaraj enspezoj apenaŭ transpasas 300 germanajn markojn. Dume el Okcidento oni proponas konsiderindajn materiajn helpaĵojn, kondiĉe ke oni starigu privatan universitaton. Konklude, li jesas al albana privata universitato.

Tiujn tagojn, dum televizia konversacio, oni reelendis kronikaĵon el la jaro 1993, kiam sinjoro Adem Demaçi antaŭvidis la politikajn evoluaĵojn de la du lastaj jaroj. En la studio li ankaŭ estis invitita. Demandite de la ĵurnalisto, ĉu

la albanoj sin sentas liberaj nun en Kosovo, Demaçi respondis: „Sendube ne, ili ja libere enspiras, sed ili ankoraŭ ne estas liberaj, ĉar ili ne komandas mem. Por ke ili fariĝu liberaj, ili devas tion pravigi per siaj agoj antaŭ la mondo, tio estas ili devas konsciiĝi politike, labori por Kosovo, kiel eŭropaj civitanoj.” Mi aŭdis el lia buŝo, ke albanoj devas fari plejblon por plibonigi sian imagon je la okuloj de la mondo, evitante kian ajn eksceson, konforme al sia sana kaj pozitiva morala tradicio.

La Groto de Gadime

Unu el niaj vojaĝceloj estis la fama Groto de Gadime, situanta tre proksime de mia naskiĝvilaĝo. La groto, je la fino de la jaroj 1960 malkovrita tute hazarde de vilaĝano, kiu eligis ŝtonojn por konstruado, havas praecon je 80 milionoj da jaroj! Ĝi konsistas el tri etaĝoj, havas multajn malgrandajn lagojn, naturajn labirintojn kaj miraklajn halojn. Stalaktitoj kaj stalagmitoj en ĝi formas plej diversajn figurojn. Ĝi rezistis al la ŝtormo de la jaro 1999, danke al siaj laboruloj, aparte al sinjoro Nazif Tasholli, kiu servas tie sindoneme de antaŭ 24 jaroj.

Ie ni vidis kristalon je formo de du fingregoj, al kiu serboj detranĉis unu el la fingregoj. Certe, se estus tri fingroj (serba simbolo), rimarkigis Nazif humure, ili restus nedamaĝitaj ... Tiel serboj agis ankaŭ kun alia kristalo, je formo de la agloflugilo. Laŭ kalkuloj de sciencistoj, por formiĝo de unu milimetro da kristalo, necesas 30 000 jaroj.


Ni vidis paron de stalaktito kaj stalagmito alproksimiĝintaj unu al la alia, kiuj ektuŝiĝos nur post 1,5 milionoj da jaroj da jaroj! La paro estis baptita *Romeo kaj Julieta*. Multaj junaj kaj maljunaj paroj fotigis sin tie. En alia loko, alia tia paro da kristaloj aspektis tiel proksima, kvaŭzaŭ ektuŝiĝinta, sed ne, ekzistis spaco je unu milimetro, do la ektuŝiĝo okazos post 30 000 jaroj! Ie la vizitanto vidas du kristalojn samtipajn, similajn al la homa lango, kiujn la ĉiĉerono nomis *la bopatrino lango*, sed tuj poste aperas simila lango, nomata *la lango de bofilino*, same longa ...

La groton de Gadime jam vizitis pli ol 20 000 gelernantoj, tamen ankoraŭ oni ne ricevis la monsumon elspezitan por ĝia regulado kaj bonordigo. Certe, en la estonta libera Kosovo, la groton vizitos miloj da turistoj el Albanio kaj fremdlandoj.

Kosova vilaĝo


Albanoj en Kosovo sin distingis ĉiam per sia granda volo je laboro. La fertila tero de Kosovo pliriĉiĝis per senlaca laboro de ĝiaj agrikulturistoj. Ni vidis ke multaj vilaĝanoj konstruis jam belajn vilaojn, meblitajn kaj provizitajn per akvo kaj elektra energio, kiel en la urbo. Faik Hoxha [hoĉĵa] en Ĉellopek [ĉellopek] antaŭ 20 jaroj instalas sistemon de elektra pumpado, certigantan akvon 24 horojn tage, kaj alian sistemon por akvumi la agron. Ni vidis traktoron, veturilon kaj higienan bovinejon. La agro produktis, krom la cerealojn, ankaŭ legomojn kaj kiajn ajn fruktojn. Ĉiujn tiujn la serba armeo provis forrabi kaj detru, sed multaj vilaĝanoj ne forlasis siajn terpecojn.

En la vilaĝo Hajmali, apud Priština, ni rimarkis la vilaojn de la fama aferisto Bexhet Pacolli [bedĵet pacoli], uzitajn dum milite kiel rifuĝejojn de serbaj oficiroj. Multaj elmigrintoj revenis porĉiame el diversaj landoj de Eŭropo. Ili konstruis kaj pligrandigis siajn loĝejojn, agrikulturan teknikon kaj la vilaĝajn stratojn. Similaj vidaĵoj estis ankaŭ en



BARDHYL SELIMI

Marmora Groto en Gadime apud Lipjan.



Ortodoksa preĝejo apud la moskeo en la sama korto - signo de religia toleremo de la albanoj.

Gllavica, Gadime, Llukagji [lukaĝi], Babush, Mirash k.a.

Shemsi Reçica [ŝemsi reĉica], profesoro pri matematika logiko en filozofia fakultato, estis rekonstruanta sian hejmon, kien li revenis kun sia familio el la germana Kaiserslautern. Same, Ismet estis stariginta modernan vilaon, kiun enŭius ĉiu aferisto en la urbo. Kompreneble en Kosovo ekzistas ankoraŭ multaj vilaĝoj tute bruligitaj kaj multaj familioj vivas daŭre en la tendoj donacitaj de KFOR, sed io estas certa: tia mizera stato ilia ne longe daŭros, ĉar la tieaj albanoj estas laboremaj kaj optimismaj pri sia estonteco. Dum intimaj interparoladoj en la sidĉambroj de la vilaĝo, oni rakontas al mi pri la tagoj de milito, pri la vagado de homoj de unu kvartalo al la alia, de unu vilaĝo al la alia, por eskapi la persekuton kaj murdon fare de la barbara serba armeo.

Multaj el ili transpasis la landlimon kaj rifuĝis ankaŭ en Albanion, kiel en Hamallaj de Durrës [dures], en Lezhë [leĵ], Kukës [kukes], Sarandë [sarand] kaj aliloke. Tiel ili amikiĝis ankaŭ kun homoj de „Malnova Albanio”.

La Preĝejo de Sultano Murat

Ne malproksime de la ĉefurbo, en la vilaĝo Mazgit, apud Obiliq, staras la Preĝejo de Sultano Murat la Unua. Ĝia prizorgantino, islamana bosnianino Sanije Tyrbetari, akceptas nin varme kaj klarigas multajn faktojn el la historio. El ŝia buŝo mi eksciis, ke Sultano Murato la Unua estas mortigita de albano nomita Miloŝ el la albana vilaĝo Kopiliq en Drenica, sed serboj malprave alpropietigis lin al sia gento. La preĝ-

ejo nun, kiel antaŭe, estas gardata de albanoj mem, kiel islama kultobjekto, ne rilatanta multe al Sultano.

Sur alia monteto, proksime de ĝi, staras ekde la jaro 1953 ŝtonturo 15 metrojn alta, memore al la legendeca Batalo de Kosovo-Kampo, en junio de la jaro 1389. Antaŭ 11 jaroj, Slobodan Miloŝeviĉ arigis tie milionon da serboj el la tuta Serbio por memori la okazintaĵon, kiu, laŭ serboj, simbolas heroecan spiriton kaj glorecon de serboj. Ili, tute maljuste, neas la kontribuon de ĉiuj popoloj de iama Balkanio, inkluzive de pli multnombraj albanoj, gvidataj de du princoj Gjergj Balsha la Dua [ĝerĝ balŝa] kaj Arianito. Kun ni vizitis tiun monumenton ankaŭ tri hungaroj, oficiroj de KFOR, kiuj diris, ke en tiu batalo partoprenis kaj komandis ankaŭ ilia tiama fama reĝo Janoŝ Huniado. Do temas pri koalicio de balkanaj popoloj kontraŭ osmanaj hordoj.

Mirinde, la monumento estis gardata de taĉmento de norvegaj trupoj, ĉar iu tentis damaĝi ĝin per grenadoj. Kial do? Albanoj devas mem gardi tiun memorigaĵon, ĉar tio spegulas ilian pasintan glorecon. Kompreneble, oni devas korekti ĉiujn serbalingvajn surskribojn en ĝi, montrante al la vizitantojn nur la veron, en diversaj lingvoj.

La reformoj de UNMIK

Dum niaj interparoladoj kun multaj civitanoj, ni sentis ilian maltrankvilecon pri la nuna amasa senlaboreco. Pro siaj bezonoj, la internaciaj instancoj dungis provizore milojn da albanoj. Sed poste, kiam tiuj instancoj ne plu estos en Kosovo?

Same, UNMIK entreprenis vicon da

reformoj por redukti la laboristaron en diversaj entreprenoj, per enigo de pli alta teknologio. Tiel, en Elektroekonomio de Kosovo, kie estas nun 10 000 laboristoj, necesas laŭ kalkuloj de UNMIK nur 4500; en sanprotektada sistemo nun laboras 13 000, sed oni bezonas nur 7000, ktp. Oni akceptis ĉi-jare en universitato nur 4500 novajn studentojn anstataŭ 7100 en la lasta lernojaroj! Ĉi tiuj problemoj postulas solvon, ĉar la senlaboreco estas alia granda malbono por la estonta Kosovo. Ni esperu, ke prikonsiderante la riĉaĵojn de la lando, Kosovo plimildigos ankaŭ tiun ĉi problemon.

Publika ordo en Kosovo

Mi povis konstati relative bonan publikan ordon en la tuta lando. Mi devas konfesi, ke la vivo tie estis pli sekura ol en Albanio mem, kie la ŝtatpotenco estas tute forigita. Multfoje mi vojaĝis nokte de unu urbo al alia kaj de vilaĝo al urbo, tute senĝene kaj senprobleme. Mi vidis homojn promeni en Priština, pro varmego, ĝis la malfruaj horoj de la nokto. La internacia polico kaj nove trejnitaj policistoj jam kontrolas sufiĉe bone la trafikon. Oni ne rajtas veturi dudirekte en plejmulto de la urbaj stratoj, transpasi la difinitan rapidecon en certaj partoj de la interurbaj vojoj, parkumi sian aŭton kien ajn, ktp.

Mian akompananton, iunokte, skandinava policisto tre ĝentile, sed tre maltolereme monpunis je 50 germanaj markoj ... Mi rimarkis survoje policistojn mezurantajn la rapidecon de veturiloj per radaroj. En Kosovo okazas bedaŭrinde ankaŭ krimoj, sed, kiel rimarkigis unu el iamaj ĉefoj de KFOR, ili estas malpli ol en, ni diru, Berlino, kie vivas pli da homoj. Kompreneble, multaj misinformoj kaj troigoj estas produktitaj en la oficejoj de sekreta serba polico.

Vizitu Kosovon!

Unuavice Kosovon devas viziti la albanoj de aliaj teritorioj, ankaŭ el Albanio, ĉar dum duonjarcento ties gejunuloj eklernis pli multe pri Afriko ol pri ĝi. Pluraj albanoj sekve opiniis, ke Kosovo estas nur iu distrikto aŭ granda vilaĝo, kaj ne vasta lando kun almenaŭ 25 urboj kaj raraj belaĵoj. Sed Kosovo estos malfermita ankaŭ por la cetera mondo, unuavice por eŭropanoj, kiuj povos tiel koni ĝin pli realisme kaj korekti kiun ajn malpravan opinion pri ĝi, disvastigante de diversaj informfontoj. Kosovo estas alirebla per busoj, aviadiloj kaj aliaj veturiloj, ankaŭ tra Albanio.

Bardhyl SELIMI

Atentokapta sed ruĝkrajoninda

Strange, strange, strange. La sola aŭtoro el ĉiuj, kapablinta por la Adelajda Kongresa Universitato liveri manuskripton lingve seneraran kaj stile neriproĉeblan, liveras al ni nun libron, en kiu la presdialetoj strange abundas kaj la lingvaĵo abunde strangas. Tiom pli domaĝe, ĉar la rakontofadeno meritis vere iomete pli da metia kvalito kaj lingvaĵa prudento, ol oni ĉi-verke prezentas al ni.

La intrigo

Temas pri historio, baziĝanta sur veraj okazaĵoj en Germanio fine de la sesdekaj jaroj. La protagonisto estas juna brito, kies taglibro – laŭ aŭtoro aserto – fundamentis la rakonton. Okaze de estado en Germanio por perfektigi siajn lingvajn sciojn, tiu brito iomete hazarde kaj preskaŭ kontraŭvole iĝas provizora hejmestro en hejmo por mizeruloj. Tamen tiuj ĉi mizeruloj estas tre specialaj. Temas senescepte pri negermanaj viktimoj de naziaj abomenaĵoj. Tiuj kompatindaj homoj, psiĥe frakasitaj, poste en civila Germanio iel ne sukcesis reordigi sian vivon kaj pro diversaj krimoj aŭ krimegoj trafis en malliberejon. Post ilia liberigo, ĝuste tiu ĉi hejmo – speco de rifuĝejo – pretis akcepti ilin, pro tio, ke la sufiĉe mistermotiva brita hejmfondintino traktis ilin eksaliancanoj en la tiama milito. Ŝi tute malkaŝe malamas germanojn kaj ĉion germanan. Tiu ĉi frenezeta fondintino, same kiel ŝiaj frenezegaj ŝafidoj, vivas ankoraŭ en epoko pasinta, kvazaŭ la nazioj aktuale plu rabus kaj rabius.

Malvolviĝas ege stranga kaj interesa rakonto en religia karitata socialhelpa medio. Sed oni ne mistaksu. Ĝi entenas ĉiujn ingrediencojn por kapti kaj teni la atenton de la leganto. Kvankam la komenco iomete stagnas, la rakonto malrapide akiras impeton kaj baldaŭ oni ne plu povas elmanigi la libron. Ĝi komence tre subtile allogas al plulegado, ne pro iuj sensacioj, sed simple pro tio, ke oni volas scii pri la plua evoluo de la vivo de tiuj strangaj loĝantoj de la rifuĝejo. Oni sciemas pri iliaj fataloj kaj ties profundaĵoj. Dum la hejmestro laŭpove klopodas helpi tiujn frenezajn mensajn vrakojn, li pli kaj pli komprenas iliajn strangajn socie neakcepteblajn kondutojn. Meze de tiu terura teksaĵo el me-



moroj pri hororaj okazintaĵoj en la tiamaĵ koncentroj kaj la frenezaj agadoj de la hejmanoj, ekfloras unua amo, kvazaŭ misloka rozo rekte apud la sterkejo. Pri la iomete nekutima sufiĉe suka am-akompana amo, nu, pri tiu prefere legu ĉiu mem.

En la romano ĉiuj fonaĵoj pri tiama post-postmilita Okcidenta Germanio kaj ĝia socio estas precizaj. La etoso aŭtentas kaj pluraj okazaĵoj rilate la tiamaĵ studentajn ribeladojn en Germanio kredinde kunrolas. Aldone en la libro religiaj demandoj temiĝas. La parte vivrandaj roluloj havas tre malsamajn opiniojn pri metafizikaj aferoj kaj la ebla morala kodo, laŭ kiu homo teniĝu. Iel pio kaj fio, same kiel kulpo kaj senkulpo, iĝas malfacile malnodeblaj.

Kure de la libro la rakonta fluo pli kaj pli kirliĝas, kvazaŭ rapidiĝanta akvo survoje al falego. Kvankam la neevitebla klimakso forsuĉas de oni la spiron, la vera kulmino montriĝas unue epiloge. Finlege oni postlasiĝas plurfacete enpenŝiĝinta.

Fuŝoj

Nedefendeble estas, ke tra tuta libro ĉiuj propraj nomoj hazarde komenciĝantaj per majuskla litero *K* fakte presiĝas kun komenca minuskla litero *k*. Je ducerba diplodoko! Ĝuste al kiu el la tri simioj – nevida, neaŭda kaj neparola – oni komisiis por kontroli la provpresaĵon? Aŭ ĉu oni komisiis tion al absolute neniu?

Plue estas probable, ke ĉiu el la tri brunfelaj bonuloj, malgraŭ sia specie iomete limigita inteligento, konsiderinde pli bone sukcesus pri linifalda

vortodividado ol la nekonata ilaĉo, kiu ĉi-libre tumultis ĉe ĉiuj maldekstraj marĝenoj. Nome ĝi regule distranĉis la vortojn ĝisatinge de maksimuma mistifiko. Tricentpaĝaj romanoj – kaj pri tia temas – certe ne estiĝas dum la preterpaso de unu nokto aŭ en la tempodaŭreto inter barbrizado kaj ekboligo de matenmanĝa ovo. Do tiom pli skandale kaj nepardoneble estas antaŭprese fajfi pri rigora kontrolado de la presotaĵo. Jam postulas simpla deco, ke oni provlege adekvate laŭ la penon de la aŭtoro verki tian ampleksan romanon.

La unua lingvaĵa manko rilatas al nomoj. Konate, la opinioj iomete diverĝas pri tio, ĉu oni esperantigu nomojn aŭ ne. Sed, ke iu ne esperantigas kaj, aldone al tio, tute ne uzas akuzativon ĉe nomoj, tio estas rekte kontraŭ la konsiloj kaj modeloj donitaj de Zamenhofo.

Aldone, kombine kun la aĉa vortodividado kaj la minusklaj *k*-oj, la tuta noma afero – ja fremdortografia – iĝas ne plu eltenebla ĉiupaĝa incito.

Sed la lingvaĵo estas aldone kritikinda. Abundas anglismoj – ĉu vortplurpe, ĉu vortunuope. Tipe la aŭtoro elektas radikon uzatan nur science en Esperanto, kaj plene mise donas al ĝi ĉiutagan signifon laŭ la angla. Iugrade la samo estas konstatebla rilate kelkajn uzatajn germanismojn. Simile malmankas poeziaj neologismoj, neniel apartenantaj al teksto proza. Ĉiun fojon tio okazas sen nur ombro da neceso. Aldone estas pluraj aliaj strangaj stilaĵoj – ekzemple, la senescepta enteksta uzo de „ptm” anstataŭ „posttagmeze”, aŭ „pretervivi” anstataŭ „transvivi”. Kaj pri tio, kion signifu „blanka mensogo”, multaj ne-angloj certe senfine cerbumos. Tamen por nun ne tro tedi, la recenzanto rezignas pri longega pruvlisto de tiaj misuzoj.

Plene fiaskis ankaŭ la klopodo de la aŭtoro plurloke en sia romano redoni en la dialogoj de la agantoj germanajn dialektojn aŭ eksterlandulajn misprononcojn de la germana. Konsentite, jen sufiĉe malfacila traduktasko, kiu eble principe ĉiam devos fiaski en Esperanto.

La romano estas skribata en la miformo. Ĉi-romane troviĝas tamen du malsamaj mioj. Unue temas pri la aŭtoro mem, kiu rolas kiel kronikisto raportanta pri siaj dumintervjuaj spertoj ĉe la kolektado de la romana materialo, due temas pri la protagonisto de la romano. La saltoj inter la du mioj

Senmorta Puŝkin

La poeto Aleksandro Puŝkin akompanas ruslingvanojn dum la tuta vivo. La infanoj aŭskultas aŭ legas liajn versaĵojn; plenaĝuloj ĝuas liajn lirikajn versaĵojn, grandajn poemojn kaj prozaĵojn. Malpli konataj sed ne malpli ŝatataj estas liaj spritaj kaj petolaj verkoj kiel „Gabrielado”. Sed la mondan famon li akiris unuavice pro la vers-romano *Eŭgeno Onegin*, kiun multaj eksterlandanoj konas precipe danke al la samnoma opero de Petro Ĉajkovskij.

Aleksandro Puŝkin estas konsiderata ankaŭ kiel kreinto de la rusa literatura lingvo. Kvankam ĉe li renkontiĝas arĥaismoj, lia lingvaĵo estas klara kaj bela ankaŭ hodiaŭ, dum liaj antaŭuloj nun estas malpli facile legeblaj.

Ne mirindas, ke esperantistoj ĉiam strebis prezenti verkojn de la genia poeto al la tutmonda legantaro. La plej konata estas *Eŭgeno Onegin* en traduko de Nikolaj Nekrasov. Manuskripte ekzistas almenaŭ du aliaj, pli modernaj tradukoj de Sergej Rublov kaj Nikolaj Danovskij. Sed la unua esperantigita verko de Puŝkin aperis ankoraŭ en la jaro 1888, tio estis *La neĝa blovado* tradukita de Antoni Grabowski.

La 200-jaran jubileon de la poeto rusiaj esperantistoj celebris per la libro *Elektitaj verkoj*, kiun kompilis Mikaelo Bronŝtejn kaj Vladimir Samodaj. La rikolto estas riĉa kaj



fierinda. La prezentitaj tradukoj estas modernaj, escepte de tri prozaĵoj el la plumo de Andreo Fiŝer, kiuj odoretas je „antikva” Esperanto. Precipe elstaras grandaj poemoj kaj dramoj tradukitaj de Mikaelo Bronŝtejn. Ankaŭ la aliaj tradukintoj – Ivan Lubjanovskij, Sergej Rublov, Isaak Ĥoves, Mikaelo Giŝpling, Konstantin

Gusev, Nikolao Fedotov, Mikaelo Povorin, Nikolai Lozgaĉev – klopodis laŭeble fidele transdoni la spriton kaj la formon de la poezio de Puŝkin.

Por krei imagon, kiel sonas Aleksandro Puŝkin en Esperanto, ni citu lian etan versaĵon „Al la vartistino”:

*Al mia vivo tre mizera
Maljuna mia karulin’!
Solece, en arbar’ severa,
Delonge vi atendas min. Ĉe la fenestro de kabano
Sopiras vi en ĉiu hor’,
Kaj tremas en sulkita mano
Trikilo via dum labor’.
Rigardas vi al loko fora,
Al nigra malproksima voj’, -
Kaj premas vin sufer’ angora,
Sopiro, ĝojo kaj malĝoj’.*

1826

Boris KOLKER

Aleksandr Puŝkin: *200 jaroj: elektitaj verkoj*. Eld. Impeto, Moskvo, 1998. 240 paĝoj kudre binditaj. ISBN 5-7161-0054-6. Prezo ĉe FEL: 12,50 eŭroj + afranko.

estas abruptaj kaj sen tipografia averto. Plurfoje oni plene konfuziĝas – ĉu nun temu pri sceno, pri kiu rakontas la aŭtoro, aŭ pri sceno, pri kiu rakontas lia protagonisto. La leganto ne povas ne konfuziĝi. Li simple ne plu kapablas kun certo identigi la respektivan mion. Bedaŭrinde, tiuj senindikaj saltoj okazas tre ofte tra la tuta libro.

Konklude

Kion diri? Malgraŭ la nepretervideblaj neperfektaĵoj – kaj la spaco ege ne sufiĉis por detaleme trapingli ilin, – tiu ĉi verko estas nepre leginda. Memkompreneble, estas ĉagrene, ke

mankis la necesa ruĝa krajono de rigora revizianto. Sed Esperantuje oni ne tro postulu. Ĝuste ĉi-lande la tro-laŭdataj „bonaj aŭtoroj” plej ofte preskaŭ paranoje reagis al ruĝaj krajonoj. Sekve, ke en esperanta libro kaj la enhavo kaj la prezentado perfektos, tion almenaŭ tiu ĉi recenzanto ne plu vere esperas ankoraŭ ĝisvivi. Alivorte, estas supozeble, ke niamonde pli leginda originala romano ne tre baldaŭ aĉeteblos.

PEJNO Simono

Trevor Steele: *Neniu ajn papilio*. Eld. H. Mayer, Vieno, 2000. 337 paĝoj. ISBN 3-901752-21-8. Prezo ĉe FEL: 16,50 eŭroj + afranko.

Anna Löwenstein

Dua eldono



La ŝtona urbo

Anna Löwenstein

LA ŜTONA URBO

Ampleksa historia romano. Juna keltino en la unua jarcento de nia epoko estas portita al Romo kiel sklavo. *La ŝtona urbo* esploras ŝian penan lukton por adaptiĝi al la vivo en pli „progresinta” socio – kvankam, kiel oni malkovros, la kelta civilizacio ne estis tiel primitiva, kiel oni nuntempe emas supozi. En Romo ŝi ekkonas la fruajn kristanojn, kiuj estas ne sanktuloj sed aktivuloj en nova movado ofte dividita pro kvereloj kaj polemikoj.

La rigore kontrolita lingvoprovizo de la romano konsistas nur el fundamentaj kaj oficialaj radikoj.

Paĝoj: 356; 21 cm; glue bindita; 1999.
Serio Stafeto, n-ro 23; ISBN 90 71205 77 0.

Prezo: 24,00 EUR

Dua eldono



Internacie kuiri

Maria Becker-Meisberger

Ĉu vi ŝatus hipoglosan laŭ muelistina maniero kun leontodo-salato aŭ prefere unue Ukrainan barĉon kun pampuŝkoj kaj kiel ĉefpladon „Amo kamuflita”? Tiujn ĉi kaj ducenton da aliaj internaciaj receptoj vi trovos en la kuirlibro por frandemuloj.

Paĝoj: 192; 21 cm; kudre bindita; 2000.
ISBN 90 71205 70 3.

Prezo: 10,00 EUR

Furoro de FEL

Informoj:
tlf. +32 3 234 34 00;
tlk. +32 3 233 54 33;
rete: butiko@fel.esperanto.be
<http://retbutiko.esperanto.be>

Monato

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; legantoj en 65 landoj; fondinto: Stefan Maul; 22a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato; abontarifo varias laŭlande (petu ĝin de la eldonejo)

Eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: monato@fel.esperanto.be TTT: <http://monato.esperanto.be> Valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita kaj presita en la eldonejo

Ĉefredaktoro: Stefan Maul, Pferseer Str.15, D-86150 Augsburg. Retpoŝto: maul@newsfactory.net

Redakcia sekretario: P. Peeraerts.

Reviziantoj: Hector Alòs i Font, Edmund Grimley-Evans, Jens S. Larsen, Brian Moon, Izabel C. Oliveira Santiago, Alexander Schlafer, Katalin Smidéliusz, Anna kaj Mati Pentus, Mikaelo Lineckij.

Krome elsarkas erarojn la kontrolilo de la tekstprilaborilo Ĉapelilo 2.1.

Korektanto: Izabel C. Oliveira Santiago

Grafiko: Guido Baeyens, Eriko D'Hondt, Hugo Fontyn, Guido Van Damme.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj; represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 9,08 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen



MONATO - redaktoroj

Arto: Grigorij L. Arosev, ab/ja 31, RUS-117071 Moskva, Ruslando. Reta adreso: desperanto@mtu-net.ru

Ekonomio: Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, Belgio. Reta adreso: rotsaert@esperanto.be (nur askiaj dosieroj!) Komputilaj detaloj: WordPerfect 5.1 kaj 6, Word 6, Ĉapelilo, ASCII.

El mia vidpunkto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: maul@newsfactory.net

Enigmoj: Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 59, 4700 Eupen, Belgio. Reta adreso: jp@fel.esperanto.be Komputilaj detaloj: Ĉapelilo, Word 97.

Eseoj: Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

Hobio: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Komputado: Edmund Grimley Evans, 20 Stone Street, Cambridge, Britio CB1 2PL. Reta adreso: edmund@rano.org

Leteroj: Guido Van Damme, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Reta adreso: guido@fel.esperanto.be

Libroj: Boris Kolker, 25 Severance Center Drive, #203, Cleveland HTS, OH 44118, Usono. Reta adreso: kolker@stratos.net Komputilaj detaloj: Ĉapelilo.

Noto: Librecozojn oni ne sendu al la redaktoro proprainciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

Lingvo: YAMASAKI Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Reta adreso: syama@dokkyo.ac.jp Komputilaj detaloj: DOS - WordPerfect 5.1; Mac - MS Word; sed per retpoŝto, bv. ĉiam sendi DOS-tekstodosieron!

Medio: Haszpra Ottó, Húr u. 9/a ^{VI} Iph/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: haot@freemail.hu

Moderna vivo: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Noveloj kaj Poezio: Geraldo Mattos, R. João Motter 98, BR-81210-260 Curitiba, PR Brazilo. Reta adreso: mattos@super.com.br

Politiko: Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Reta adreso: 100103.3317@compuserve.com Komputilaj detaloj: Preferas rete senditajn artikolojn, sed povas akcepti surdiske preskaŭ ĉion; ĝenerale uzas WordPerfect 5.1 aŭ 6; Ĉapelilo 2.1.

Scienco: Haszpra Ottó, Húr u. 9/a ^{III} Iph/3, H-1223 Budapest. Reta adreso: haot@freemail.hu

Spirita vivo: Gerrit Berveling, Mussenhage 8, NL-8011 BH Zwolle, Nederlando. Reta adreso: gerrit.en.madzy@planet.nl

Ŝerco kaj satiro: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, 86150 Augsburg, Germanio. Reta adreso: maul@newsfactory.net Komputilaj detaloj: Ĉapelilo kaj Calamus por Windows.

Turismo: Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, 1010 Wien, Aŭstrio. Reta adreso: a9308197@unet.univie.ac.at

Se la temo de artikolo, kiun vi verkis aŭ intencas verki, ne troviĝas en la supra listo, tiam ne sendu la tekston al MONATO.

Kiu bredas fiŝojn ?

En mia vilaĝo estas aparta strato kie staras kvin domoj vicigitaj, unu flanke de la alia. Ĉiu domo havas sian propran koloron. En ĉiu domo loĝas unu viro. La kvin viroj havas kvin malsamajn naciecojn, trinkas kvin malsamajn trinkaĵojn, ludas kvin malsamajn instrumentojn kaj bredas bestojn el kvin malsamaj specioj. Feliĉe ili interparolas esperante ! Jen kelkaj informoj :

- 1) La norvego loĝas en la unua domo maldekstre.
- 2) La anglo loĝas en la ruĝa domo.
- 3) La verda domo staras maldekstre de la blanka domo.
- 4) La dano trinkas teon.
- 5) Tiu, kiu ludas pianon loĝas apud tiu, kiu bredas katojn.
- 6) Tiu, kiu loĝas en la flava domo, ludas violonon.
- 7) La germano ludas akordionon.
- 8) Tiu, kiu loĝas en la meza domo, trinkas lakton.
- 9) Tiu, kiu ludas pianon, havas najbaron kiu trinkas akvon.
- 10) Tiu, kiu ludas trumpeton, bredas birdojn.
- 11) La svedo bredas hundojn.
- 12) Tiu, kiu bredas ĉevalojn, loĝas apud la flava domo.
- 13) La norvego loĝas apud la blua domo.
- 14) Tiu, kiu ludas gitaron, trinkas bieron.
- 15) En la verda domo, oni trinkas kafon.

| | | | | | |
|--------------|--|--|--|--|--|
| HOMOJ | | | | | |
| DOMOJ | | | | | |
| TRINKAĴOJ | | | | | |
| BESTOJ | | | | | |
| INSTRUMENTOJ | | | | | |

Jacques Ferroul, Francio



Do, sendu kiu bredas fiŝojn...antaŭ la 16a de marto al nia redakcio :

MONATO (Enigmoj) Frankrijklei 140 BE-2000 Belgio aŭ rete jp@fel.esperanto.be.

Ne forgesu indiki vian preferatan premion.



- 1) **Plena poemaro** (Eŭgeno Miĥalski)
La plenan poezian verkaron de tiu ĉi rusa aŭtoro forte influis la komunisma idearo.
- 2) **Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ** (Adriaan Roland Holst)
Mallonga romano inspirita de keltaj elementoj, perleto de la nederlanda literaturo.
- 3) **La ludanta lumo** (Leopold Vermeiren)
Ĉarmaj erotikaj rakontoj.



Solvo julio-aŭgusto

Ĉirkaŭ 20 legantoj ĝuste solvis la ĝemelan enigmon de M. Damsky el Hungario (ne Germanio) ĉu sen ciferoj, ĉu kun ciferoj, ne gravis. 3 povas ĝui premion nome: s-ino S. Authier, Francio; Wolfgang Loose, Germanio kaj Zdeněk Hrsěl, Ĉeĥio; korajn gratulojn.

— anoncetoj —

(Re)Abonu FONTO-n! La sola sendependa monata literatura revuo en Esperanto FONTO en januaro komencos sian 21an jarkolekton: numeroj 241 - 252. Aperas 12 numeroj jare - sendataj ĉiam po du samkoverte. Kun riĉa kaj varia enhavo. Por la tuta jaro 2001 tio kostas nurajn 60 guldenojn! Pagu al UEA - konto bays-f - kaj samtempe skribe aŭ rete informu la redaktoron Gerrit Berveling en Zwolle, Nederlando. Eblas kompreneble pagi per FEL, kiu estas unu el niaj perantoj! Ankaŭ ĉiuj antaŭaj jarkolektoj estas ankoraŭ haveblaj: nemalhavebla kaj riĉega *fonto* de la literatura E-historio de la lastaj 20 jaroj! Ĉiu jarkolekto 60 guldenojn; pri rabato por la tuto samtempe eblas interkonsenti.

Naturista Vivo, organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE) en 2001 aperos kvarfoje, sur 4*24 paĝoj (la duonon konsistigas bonkvalitaj fotoj) kaj kostas 14 eŭrojn jare. Petu senpagan provnumeron de la redaktoro, József Németh, Fö u. 41/5 HU-8531, rete: nlalt@konyvtar.c3.hu.

Franclingve, kiam ekestas malvarme aŭ kiam oni timegas ion, oni diras: „J'ai la chair de poule!"; se oni tradukas tiun esprimon laŭvorte, ĝi iĝas: „Mi havas kamon de kokino!" Sed, laŭ iu vortaro, esperantlingve oni diras: "**Mi havas haŭton de ansero** (aŭ anserhaŭton)!" Ĉu vi povas sciigi al mia klubo, kiel oni diras tion ĉi en via lingvo? Se ekzistas tia esprimo en via lingvo, bonvolu sendi al ni: unue la esprimon en via lingvo, due ĝian prononcon (almenaŭ proksimume) kaj trie ĝian tradukon laŭ-



Konu viajn limigojn... ...kun via persona alkoholestilo

Per DRIVEGUARD vi nun povas eviti grandajn riskojn (akcidentojn, altajn punojn, perdon de via stirrajtigilo). Blovu dum 8 sekundoj kaj vi tuj scios la alkoholemlaĵon en via sango.

Normala prezo: 69,50 €
Speciala promocio prezo: 59,50 €
(valida ĝis 31-12-2000) (inkl. 6 x 1,5V pilarojn)

SAMTEMPE VENDISTOJ / DISTRIBUISTOJ SERĈATAJ!

Mendu aŭ petu informojn ĉe: ALCOLINE bvba / Rob Ebenau

Mansionstraat 20, 2990 Wuustwezel, Belgio

Tel.: +32 (0) 3 633 15 35 - Fax: + (0) 3 633 02 74

Reto: alcoline@online.be

Konfidu al "DRIVEGUARD" hejmenigi vin sekure!

vorte esperantlingve. Se ne, tamen skribu por diri, ke ne ekzistas tia esprimo.

Mi preferas leteran respondon al Esperanto-Klubo Luizo Pasteŭro, Collège Louis Pasteur, 48 Bd Paul Claudel, FR-13009 MARSEILLE (FRANCIO). Sed eblas sendi retan respondon al ekolopo@voila.fr. Miaj klubanoj estas infanoj ĉirkaŭ 12 jaraj. Je iliaj nomoj, antaŭe dankon!


Mia nomo : Jacques FERROUL ; mia propra retadreso : jaef@voila.fr

Post kelkara foresto nun reaperis la kuirlibro "Internacie kuir". Al tiu ĉi verko kunlaboris pli ol cent dommastroj kaj dommastrinoj, kiuj, sub la gvido de Maria Becker-Meisberger, arigis la plej interesajn receptojn el sia regiono. Ĉu vi ŝatus hipogloson laŭ muelista maniero kun leontodo-salato aŭ prefere unue ukrainan

barĉon kun pampuŝkoj kaj kiel ĉefpladon "Amo kamuflita"? Tiujn ĉi kaj ducenton da aliaj receptoj vi trovos en la kuirlibro por frandemuloj. Kun antaŭparolo de Marjorie Boulton. 320 paĝoj; formato DIN A5; prezo ĉe Flandra Esperanto-Ligo (retbutiko@fel.esperanto.be) 10 eŭroj + afranko.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la interretpaĝoj de FEL: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.html.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.



Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen

valoro: _____

Donaca
karto

subskribo: _____

Esperanto ne skribas en FEL-lingvo

Utila Donaco!

- Difinu mem la valoron de via donaco.
- La kupono estas interŝanĝebla kontraŭ libroj, diskoj aŭ Monato-abono.
- Mendu la kuponojn ĉe butikoj de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tel: +32 3 234 34 00 Fakso: +32 3 233 54 33
Retpoŝto: butiko@fel.esperanto.be

Nova sistemo por instrui la internacian lingvon

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO



VIDBENDA KURSO
POR INSTRUI
LA INTERNACIAN LINGVON

Verkita de d-ro Paul Gubbins
Laŭ koncepto de Edwin Grobe

© 1998, Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Mendu la PAL-version ĉe:
Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel:+32 3 234 34 00

Reto: butiko@fel.esperanto.be

Prezo de lecionoj 1 ĝis 4: 81
EUR + afranko

Prezo de lecionoj 5 ĝis 8: 81
EUR + afranko

ESPERANTO PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Ĉu tute nova sistemo por instrui la internacian lingvon? Efektive. Vi ja estas preta ekaventuri en la lernadon de Esperanto. Tamen, ne domaĝu kelkajn minutojn por rigardi la mapon. Tiel vi komprenos la vojon kiun sekvos via lernado kaj kiel vi laŭiros ĝin.

Jam de la komenco vi plene trempiĝos en la lingvo. Ne timu, tamen, vi ne dronos! Ĉio subtenos vian komprenon dum vi konatiĝos kun la sono kaj uzado de la lingvo. Esperanto havas apartajn avantaĝojn kompare kun la tasko kiu frontas lernantojn de aliaj lingvoj. Ĉar ne ekzistas neregulaj formoj kaj esceptoj, tiuj ne bremsas la

disvolvon de lingvaj intuicioj. Dum vi rigardos la lecionojn, vi ekhavigos ĉiam pli kaj pli da memfido pri tio kion vi lernas. Ĉiufoje vi komprenos pli el la kunteksto de la materialo prezentita. Memoru ke plej gravas lasi la materialon enflui sen ĉagreniĝo pro tio ke vi ne tuj komprenas la tuton. Vi konstatos la rezultojn kiam vi donos al vi okazojn por praktiki kaj uzi la lingvon. Ni nun vidu kiel kaj kial ĝi funkcios por vi...

Prof. Duncan Charters

Prezidinto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj